

# Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)  
95-a jaro • n-ro 1153 (11) • **Novembro 2002**

## Novaj E-libroj el Brazilo



**Ni laboru  
kaj esperu!**  
**Esperanto, interreto  
kaj multkultureco**

**Kalendaro  
2002–2003**  
**Kaj tamen  
la Tero turniĝas!**

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio  
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

### Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto  
p/a Stano Marček, Zvolenská 15  
SK-036 01 Martin, Slovakio  
Telefono kaj telefaxo:  
+421 43 4222 788  
Retpoŝto: revuo@uea.org

### Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

### Redaktofinio:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

**Abonprezo:** varias laŭlande (EUR 32; USD 30; JPY 3300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,00.

**Anonctarifoj (EUR):** 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tujaj ripeto 20%.

**Banko:** Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

### Kreditkartoj:



### Adreso de la Centra Oficejo de UEA:

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefaxo: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Trevor Steele.

# Vi trovos...



ke inter ni ekzistas homoj, kiuj faras ion konkretan por plifortigi nian movadon. Unu el ili decidis zorgi pri niaj posteuloj, la komencantoj (bv. legi apude). En la novembra revuo vi trovos ankaŭ asertojn, ke Esperanto kaj interreto estas bona paro kaj ke ili favoras sin reciproke; daŭrigon de la rubriko Landaj Asocioj, satiron, lingvan angulon (rifuzita, perdita, retrovita post 54 jaroj, sed daŭre aktuala letero al legantoj de *Literatura Mondo*); inviton al Esperantujo en formo de aktuala Kalendaro, kaj retrorigardon al la ĵus okazintaj aranĝoj; vi ekscios, kiuj libroj furoris en Fortalezo kaj kiuj aperis poste... Agrablan legadon deziras kaj je persona renkontiĝo kun tiuj, kiuj venos al la novembra Malferma Tago ĝojas

## Enhavo

- 219 .... Ni laboru kaj esperu! (Viktor Kudrjavcev).  
220 .... Landaj Asocioj – la kolonoj de UEA (Michela Lipari)  
222 .... Esperanto, interreto kaj multkultureco (Li Shijun).  
224 .... Agi por la ideo (Satiro de Gunnar Fischer kaj Till Schönberner).  
225 .... Kaj tamen la Tero turniĝas! (Tomaš Pumpř).  
226 .... Furoraĵoj de la Kongresa Libroservo. Navige tra TTT-paĝoj.  
227 .... Kalendaro 2002–2003.  
229 .... Abontarifoj 2003 de la Libroservo de UEA. Belartaj Konkursoj de UEA en 2003. Malfermitaj pordoj en Roterdamo. UEA pardonpetas.  
230 .... RECENZIOJ: Rita Valiūkaitė pri *Kiel oni akiras ekonojn pri la superaĵoj mondaj?* kaj *La edukado de la infano el la vidpunkto de la spiritoscienca*.  
231 .... Garbhan MacAoidh pri *Planned Languages: From Concept to Reality*. Ziko Marcus Sikosek pri *Lingva Planado kaj Leksikologio. Language Planning and Lexicology*. Baldaŭ 75 000 e-Libro (Franko Luin).  
232 .... DĴ Kunar pri kompakta disko *La Porkoj: Ŝako*. LASTE APERIS.  
234 .... LOKE, FAKE, PERSONE.  
235 .... La Ondo de Esperanto. OFICIALA INFORMILO. ANONCETO.  
236 .... TRA LA MONDO: Ekologie kaj folklore en Rigo (Mara Timermane). Inaŭguro de la nova brita sidejo (David Bisset). Niaj tagoj en Pollando (Andrzej Sochacki).  
237 .... Paeljo, Valencio, Murcio (Augusto Casquero). Sukcesa premiero de BEF (Halina Gorecka).  
238 .... Ĝustigo. Verku fake por TAKE! Krucenigma Konkurso (Stano Marček).

**FRONTPAĜE:** Al la ĉi-jara UK en Fortalezo UEA ne povis alporti tiom da libroj kiel kutime. Tamen la gastigantoj de la kongreso regalas la kongresanojn per multaj novaj titoloj. Tiujn vi nun povas trovi ankaŭ en la Libroservo de UEA.

## Estraro de Universala Esperanto-Asocio

**Prezidanto (strategia forumo, Unesko):** d-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎+39-06-957-57-13; f+39-06-957-66-33; renato.corsetti@co.uea.org.

**Vicprezidanto (strategia kaj planado, esploro kaj dokumentado, UN Novjorko):** prof. Humphrey Tonkin, 279 Ridgewood Road, West Hartford, CT 06107 Usono; ☎+1-860-561-26-69 [h]; f+1-860-561-52-19 [h]; ☎+1-860-768-44-48 [of]; f+1-860-768-44-11 [of]; tonkin@mail.hartford.edu.

**Vicprezidanto (eksteraj rilatoj):** prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Resp.; ☎+82-53-765-0880 [h]; +82-53-652-4488 [of]; f+82-53-652-8141 [of]; +82-53-765-0881 [h]; lee@esperanto.net.

**Ĝenerala sekretario (faka agado, rilatoj kun TEJO, rilatoj kun la Komitato, kongresoj, Nobel-kampanjo):** s-ro Ivo Osibov, Vinkovačka 25, HR-21000 Split, Kroatio; ☎+385-(0)21-535-650 [h];

+385-(0)21-355-550 [of]; f+385-(0)21-393-597 [of]; osibov@pravst.hr.

**Financo, administrado:** s-ino Ans Bakker-ten Hagen, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎/+31-(0)20-642-18-53; ans.bakker@esperanto.org.

**Eduko, kulturo, ILEI-rilatoj, sporto, afrika agado:** s-ro Gbego Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎+228-227-21-17; esp.togo@cafe.tg.

**Informado:** s-ro Andrej Grigorjevskij, ul. Lenina 40-14, RU-429120 Sumerlja, Ĉuvaŝa Respubliko, Rusio; ☎+7/83536/59856; andreo@mail.ru.com.

**Landa agado:** s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-06-39-72-61-98; f+39-06-39-72-61-69; michela.lipari@esperanto.org.

**Observanto de TEJO:** s-ro Marko Naoki Lins.

**Observanto de ILEI:** s-ro Mauro La Torre.

## Ni laboru kaj esperu!

Viktor Kudrjavcev

**Dum mia plurjara aktivado mi ofte pensis: Kion mi, ordinara esperantisto, povas konkrete fari por plifortigi nian movadon? Mi rimarkis, ke multaj kiuj jam lernis nian lingvon, ne restas en la movado kaj lasas ĝin. Mi do penis serĉi respondon al la demando kaj provis trovi iun eblon por ŝanĝi la situacion.**

La ĉefa strebo de ĉiu vera esperantisto estas plivastigi nian komunumon kaj pliefikigi nian agadon. Por realigi tion mi decidis agi konsekvenca. Komprenante, ke la propagando estas spino de nia agado, mi komencis de la informado.

Indas rakonti, kiamaniere mi penis organizi la informadon: mi verkis artikolojn pri Esperanto kaj dissendis ilin al multaj distriktaĵoj, urbaj kaj regionaj ĵurnaloj. Informante kio estas Esperanto mi citis ĝian difinon, kiun mi prenis el la *Nacia Enciklopedio Vortaro* kaj rimarkis, ke la mencio de la nacia enciklopedio pozitive efikas al la redakcioj kaj al la legantoj, kio helpis pli rapide atingi la celon. Mi petis la redakciojn ne trakti mian artikolon kiel reklamon, ĉar mi ne celis monan profiton kaj volis instrui ĉiujn interesigantojn koresponde, tute senpage.

La konvinkitoj pri la taŭgeco de esperantistaj idealoj komencis lerni la lingvon en mia koresponda kurso. La instruado estis la dua parto de mia konsekvenca laboro. Mi ŝatis ne nur plimultigi la nombron de la lernintoj, sed ankaŭ volis stimuli la kursfinintojn al praktika utiligado de la lingvokono. Mi provis helpi al la novuloj iĝi aktiva parto de nia lingva komunumo, uzante por tio jam konatajn rimedojn: invito al niaj lokaj renkontiĝoj, paroligo, propono legi bonan Esperantan literaturon ktp. Pensante pri eblaj formoj de la praktika utiligado, mi trovis propran rimedon aktivigi la novulojn. La tri celojn, kiujn mi sekvis en mia agado (informi, instrui kaj helpi utiligi), enhavas la nuna laborplano de UEA: *Informado, Instruado kaj Utiligado*.

Multaj homoj, ricevinte informojn pri Esperanto kaj fininte kursojn (korespondajn, ĉeestajn, interretajn ktp) aŭ lerninte la lingvon memstare, pensas: kiel mi apliki la akiritajn lingvosciojn? Mi rememoras la proverbon de Zamenhof: *Plej granda potenco kuŝas en la komenco*. Ja vere tre gravas, kiun paŝon homo faras en la komenco de ajna afero, kiun vojon li trovas por uzi siajn konojn kaj kapablojn.

Ekzistas multaj ebloj kiel utiligi Esperanton: partopreni renkontiĝojn kaj uzi la lingvon parolante, legi librojn kaj revuojn, apliki la lingvon en sia faka agado... Bone, se la homo mem klare vidas kaj scias, kiel apliki siajn konojn. Sed mi rimarkis, ke

multaj komencantoj bezonas helpojn en la fazo de la aliĝo al nia komunumo. Kaj estas bone se troviĝas homo, kiu delikate puŝas ilin al pliaj paŝoj, kuraĝigas la novulojn, apogas ties aspirilojn. Male, foresto de atento al la freŝaj esperantistoj, same kiel manko de klara imago kiel plu moviĝi en la medio, rezultigas ke la homo ofte lasas siajn provojn kaj la emon fari sekvajn paŝojn.

Pensoj pri ĉio tio longe eĥiĝis en mia kapo kaj mi ricevis la ideon lanĉi specialan periodaĵon, kies spacon mi povus disponigi ĝuste al la unuaj praktikaj paŝoj de la komencantoj. La ideo ŝajnis al mi realigebla kaj realiginda! Tute nature la periodaĵo ekhavis la nomon *Komencanto*, ĉar unu el ĝiaj ĉefaj celoj estis doni la eblon komenci utiligi la konojn de Esperanto. Dekomence mi proponis al la novuloj provi traduki ion negrandan, kurtan: aforismon, ŝercon, rakonton; poste transiri al sekva paŝo – verki ion memstare, originale. Mi volis ke ĉiu sentu lokon en nia medio kaj estu pli kuraĝa. Esperiga atingoj estis ke mi ricevis multajn reeĥojn de novuloj. Unu el la komencantoj sendis la sekvajn versajeton:

*Unua provo ĉiam malfacilas  
Sed por komenco ege gravas ĝi.  
Alie povas vi neniam ekscii:*

*“Ĉu kapablas vi?”*

Konsciante ke multaj komencantoj ne havas elstarajn talentojn por la kreado kaj apenaŭ famiĝos pro siaj verkoj, mi tamen komprenis, ke iliaj kontribuoj helpas al ili iom-post-iom venki la hezitemon kaj akiri lingvan lertecon. Sed okazis, ke multaj el la unuaj verkoj vere tuŝis mian koron, kaj eĉ ravis min!

Evidentiĝis ke ĉe novuloj ekzistas soifo al pli bona scio pri la historio, literaturo kaj aliaj flankoj de la lingvo kaj movado. Ili petis prilumi sur la paĝoj de *Komencanto* tiujn sferojn. Mi ankaŭ konsciis ke bona periodaĵo por novuloj devas entuziasmiĝi, klerigi kaj plibonigi la regon de la lingvo. Ja lingva lernado neniam finiĝas. Estas utile doni en la revuo ankaŭ bazajn informojn pri nia movado.

Ĉe komencantoj en la verkado mi spertis ke multaj el ili hezitas sendi siajn unuajn verkojn al periodaĵoj. Okazas ke pri la ekzisto de tiuj verkoj scias nur malgranda



Viktor Kudrjavcev kun la edzino Rafija Jafasova, kunlaboranto de *Komencanto*

rondo de konatoj. Sed multaj verkoj meritas diskonigon kaj la aŭtoroj - subtenon. La komencantaj aŭtoroj bezonas atenton kaj apartan spacon, kie ili povas prezenti siajn provojn. Evidentiĝis, ke malkaŝo de iliaj kapabloj estis motiviga forto por daŭrigi samtempe kaj la verkadon, kaj movadan agadon.

Ne hazarde mi decidis unuigi tiujn du kategoriojn (komencantojn en la lingvo kaj komencantajn aŭtorojn), kies lingvonivelo estis malsama, dezirante, ke ili kuragiĝu unu la alian kaj verkoj de "la pli fortaj" pozitive influu la verkadon de "la ĵusfinintoj" kaj inspiru ilin. Mi povas konstati, ke por multaj *Komencanto* fariĝis loko por la unua praktika uzado, kaj por la aliaj - la unua plezuro vidi sian nomon sur la paĝoj de la internacia revuo.

Mi volis ke la periodaĵo en la internacia lingvo fariĝu vere internacia, ke ĝi estu fonto de reciproka ĝuo kaj riĉigo de la legantoj el ĉiuj anguloj de nia planedo. La legantoj mem proponis verkojn en diversaj formoj: rakontojn pri siaj lokaj festoj kaj tradicioj; tradukojn de naciaj fabeloj, fabeloj, proverboj; poeziaĵojn en formo de klasikaj naciaj ĝenroj - limerikoj, hajkoj, ĉastuŝkoj ktp. Unu el la abonantoj, kiu servas nun kiel internacia policisto en Kosovo, proponis materialojn pri sia servo en formo de raportoj. Do, ĉio tio donis al la revuo vere internacian karakteron.

*Komencanto*, kiu aperis kiel provo montri ekzemplon de la aplikado, fariĝis ilo por praktika internacia kunlaboro kaj interkultura edukado. Ĝojiga fakto estas ke la revuo rezultas el komunaj klopodoj de multaj samideanoj. Ĝi do ne estas nur revuo, sed komuna afero, kiu kunigas, aktivigas kaj inspiras ĉiujn partoprenantojn. Kiu sentas sin preta aliĝi, al kiu plaĉas niaj ideoj, kiu volas elprovi siajn fortojn, tiu povas partopreni en la revuo verkante, tradukante, ŝercante aŭ pentrante.

La kampo de la poresperanta kaj peresperanta agado estas tre vasta, ĝi donas multajn eblojn kaj mi opinias, ke por ĉiu agemulo troveblas konvena spaco. Ni uzu ĉiujn vojojn por plifortigi kaj evoluigi Esperanton! Atentante kaj klerigante la komencantojn, subtenante kaj stimulantante al aktivado la esperantistojn, ni atingu tion, ke homoj ne forlasu nian rondon, sed male - ke ili restu kaj per sia agado fortiĝu nian movadon.

La vortoj el la verkoj de Zamenhof, gravurita sur lia skribmaŝino

*Ni laboru kaj esperu!*  
estu ankaŭ nia devizo!



Viktor Kudrjavcev kun la revuo *Komencanto* (Ab. ja. 132, 620041 Ekaterinburg, Rusio rete: [komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru))

# Landaj Asocioj - la kolonoj de UEA

## Universala Esperanto-Asocio konsistas el Individuaj Membroj, kiuj rekte pagas sian kotizon, kaj kolektivaj membroj de Landaj kaj Fakaj Asocioj. En tiu ĉi rubriko ni prezentas al vi la Landajn Asociojn.

### Itala Esperanto-Federacio

La retadreso: [fei@esperanto.it](mailto:fei@esperanto.it); [fesp.it@infinito.it](mailto:fesp.it@infinito.it); la hejmpaĝo: [www.esperanto.it](http://www.esperanto.it). La neoficialaj listoj: [Esperantisti-italiani@yahoo.com](mailto:Esperantisti-italiani@yahoo.com); [italaj-esperantistoj@yahoo.com](mailto:italaj-esperantistoj@yahoo.com). La sidejo estas propra. Ekzistas biblioteko ĉe la ŝtata arkivejo en Massa Carrara (Toskanio) kaj libroservo; eldonatas bulteno: *L'esperanto*, 9-fojojn jare kun 16 paĝoj. La membraro estas ĉirkaŭ mil, lokaj grupoj estas 42. La estraro estas 7-persona; la nacia konsilio 21-homa (inkluzive de la estraro). La landa kongreso okazas ĉiujare fine de aŭgusto kaj kutime daŭras 5 tagojn. Ekzistas koresponda kurso kun multaj lernantoj. La ĉefaj atingoj: disvastigo, instruado, informado, uzo de la lingvo. La ĉefa problemo: manko de mono por la disvastigo, manko de volontuloj ĉe la sidejo.



nomo Mongola Esperanto-Asocio, kaj subskribis kvarflankan kontrakton. La kunveno elektis Ch. Dogsuren kiel prezidanton, s-inon O. Oyuntseteg (eksprezidanto de malnova MEA) kiel vicprezidanton kaj Ch. Enkhee kiel Ĝeneralan sekretarion de Mongola Esperanto-Asocio.

### Norvega Esperantista Ligo

Ĝi aktivas en propra sidejo. La retadreso estas: [esperanto@online.no](mailto:esperanto@online.no); la hejmpaĝo: [www.esperanto.no](http://www.esperanto.no) kaj oficiala diskutlisto: [nel-diskut@yahoo.com](mailto:nel-diskut@yahoo.com). Ekzistas biblioteko kun ĉirkaŭ 3000 libroj kaj libroservo. *Norvega esperantista*, la landa bulteno, eldonatas 6 fojojn jare. Membroj estas 340, grupigitaj en kelkaj kategorioj: ordinaraj, junulaj, samdomaj, dumvivaj, honoraj. La lokaj grupoj estas 11 kaj la estraro estas 7-kapa. La landa kongreso okazas ĉiun duan jaron kaj daŭras du tagojn. La koresponda kurso estas tre malnova kaj neniu plu mendas ĝin. La ĉefaj atingoj: oni atingis vivkapablajn lokajn grupojn en Oslo, Trondheim kaj Tonsberg, kaj esperon pri daŭra vivo de la grupoj en Tromsø, Stavanger kaj Bergen. NEL komencis uzi la reton por informoj per la propra hejmpaĝaro kaj la reta kurso

*Esperanto Viva* (elangligita), kaj sukcesas aranĝi kurson ĉiujare en kvar-kvin urboj. Estas eldonata kvalita gazeto *Norvega Esperantisto* pli-malpli regule. Klarigoj en E-o en la tutlandaj trajna kaj busa horaroj (Ruteboka) kaj informiloj de la Ministerio pri Ekstero en E-traduko ne plu funkcias. La ĉefa problemo: minacas perdo de kvarono de la membraro dum la nuna jaro, malfacilas varbi pli ol kvin personojn por la kurso, eĉ en grandaj urboj, mankas laborfortoj. Lamas pri-

zorgado de la retpaĝoj, varbado al kaj evoluo de kursoj, informa laboro, intereso de la ekstera mondo pri Esperanto kiel serioza solvo de la lingva problemo. Esperanto estas konsiderata kiel ekzotika ŝatokupo de aparte interesitaj

### Meksika E-Federacio

La ret-adreso: [mef@esperantomex.org](mailto:mef@esperantomex.org). La hejmpaĝo: [www.esperantomex.org](http://www.esperantomex.org). La diskutlisto: *InfoEspo* (ĉe Yahoo-grupoj). La sidejo estas luita, ekzistas biblioteko kun 468 volumoj kaj funkcias libroservo. Eldonatas bultenoj *Ni Ĉiuj* (en Esperanto), 6-foje jare po 12 paĝoj kaj *Contextos* (hispane), 6-foje jare po 8 paĝoj. 40 membroj, 4 lokaj grupoj, la estraro estas 5-kapa. La landa kongreso okazas, ĝi daŭras tri tagojn, kun postkongreso (la ritmo neregula). La observanto ĉe UEA estas Luis Raudón Uribe, la ĉefdelegito Fidel Figueroa. Ne ekzistas koresponda kurso. La ĉefa atingo: la organizado de la 5-a TAKE (Tutamerika Kongreso de Esperanto) en aprilo 2001 (*sukcesa, interesa kaj neforgesebla, rim. de Michela*). La ĉefa problemo: manko de homoj por plenumi la laborplanon.



### Mongola Esperanto-Asocio

La 5-an de januaro 2002 la reprezentantoj de Mongola E-Asocio, Mongola E-Ligo, Mongola E-Junulara Organizo kaj Mongola E-Centro kunsidis kaj diskutis pri la nuna situacio de la Mongola movado. Ili decidis unuigi la E-organizaĵojn sub la



homoj. Estas malfacile havigi menciojn en la amaskomunikiloj, ne pro malfavora sinteno sed manko de novaĵoj.

### Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

La retadreso: [neelam@voyager.co.nz](mailto:neelam@voyager.co.nz); la hejmpaĝo: [www.geocities.com/esperanto-nz](http://www.geocities.com/esperanto-nz). La sidejo estas ĉe esperantisto, ne ekzistas biblioteko nek libroservo, sed la libroj - kelkaj miloj - estas stokitaj. La bulteno *Arĝenta Filiko* aperas du-foje jare kun amplekso dekkupaĝa. Membroj estas 65, dividitaj en kvar kategorioj, lokaj grupoj estas 4, la estraro estas 7-persona. La landa kongreso okazas ĉiujare kun daŭro de 3-5 tagoj. La ĉefdelegito estas G. David Dewar. Ekzistas perkoresponda kurso. La ĉefa atingo: antaŭenigo de Esperanto en Novzelando, la ĉefa problemo: manko de junaj novaj membroj.

### Pola Esperanto-Asocio

En Pollando funkcias kelkaj E-societoj (grupoj), sed la plej granda kaj plej forta estas PEA. Oni pripensas la eventualaĵon fondi federacion de E-organizaĵoj en Pollando. Regule aperas 8-12-paĝa bulteno de PEA (formato A-5) *Wydarzenia* (Evento), sendata al ĉiuj kiuj volas kovri la kostojn de la eldonado kaj sendado. Aktuale ricevas ĝin dekkelkaj filioj de PEA kaj pli ol 60 individuaj personoj. Venontjare reaperos la iama fama *Pola Esperantisto*, kiu estos ne nur la revuo de PEA, sed de la tuta pola esperantistaro. Funkcias la polaj retpaĝoj [www.esperanto.pl](http://www.esperanto.pl), kiun oni jam vizitis pli ol 350000-foje. La laborplano ligiĝas al tiu de UEA. Estas preparita nova programo de instruado de Esperanto, baldaŭ sendota al Ministerio pri Edukado por registriĝo. PEA preparas kurson por instruistoj kun granda stoko de koncernaj materialoj. Tre gravas ke tiuj kiuj instruas estu spertaj esperantistoj. Ekzistas kelkaj kursoj de Esperanto.

### Portugala Esperanto-Asocio

Ĝi havas la retadreson: [ap.esperanto@netc.pt](mailto:ap.esperanto@netc.pt) kaj la hejmpaĝon: [www.esperanto.web.pt](http://www.esperanto.web.pt). La oficialaj diskutlistoj: [pea.anonc@yahoo.com](mailto:pea.anonc@yahoo.com); [pea.diskut@yahoo.com](mailto:pea.diskut@yahoo.com). La sidejo estas luita, la ĉefbiblioteko enhavas 3125 volumojn kaj la pruntbiblioteko 888. Ekzistas ankaŭ libroservo. *Nia bulteno* eldoniĝas 4-foje jare kaj ampleksas 12 paĝojn. La membroj estas 291, grupigitaj en kategoriojn junulara/ne junulara; honora/simpla. Ne ekzistas lokaj grupoj kaj la estraro estas 6-persona. La landa kongreso ne okazas, sed ja kelkaj sporadaj renkontiĝoj. Ne ekzistas perkoresponda kurso. La ĉefa atingo: la ŝtata agnosko de la asocio kiel institucio kun publika utileco (en aŭgusto 1999). La ĉefa problemo: manko de homfortoj.

Komipilisi:  
Michela Lipari  
(daŭrigota)



Gazetara konferenco dum la ĉi-somera Jubilea Kongreso de Esperantistoj en Sosnowiec, Pollando. foto: Andrzej Sochacki

# Esperanto, interreto kaj multkultureco de Li Shijun

En la pasinta jarcento, la homaro atingis brilajn sukcesojn en sciencoj kaj teknologioj: ĝi sukcesis krei rapidajn aviadilojn, lanĉis artefaritajn satelitojn, sukcesis ekspluati nuklean energian kaj funkciigi nukleajn elektrejojn, deĉifris la sekretojn de genoj kaj sukcesis produkti klonajn ŝafon, simion ktp, kreis komputilojn kaj interreton, kiu preskaŭ nuligis la distancon en komunikado. Ni komencis novan epokon de informadiko.

## La terglobo fariĝis vera vilaĝo

Ni eniris la novan jarcenton kun novaj esperoj kaj brila perspektivo. Tamen ni ankaŭ alfrontas multajn problemojn urĝe solvendajn: la serioza polucio malsanigas nian vivmedion; la teruraj tertremoj, la tajfunoj, la tromboj restas



La akademiano Li Shijun

katastrofoj nekontraŭrimedebaj; ĉiam pli larĝiĝas la diferenco inter la riĉaj kaj malriĉaj landoj kaj la malegaleco kaj konfliktoj inter la nacioj subfosas la mondpakon. La homaro bezonas pli bonan kunlaboron por solvi la problemojn. Kaj por tio ni devas atingi pli profundan interkomprenon per interparoloj, diskutoj kaj konferencoj en diversaj niveloj. Kvankam nia terglobo fariĝis vilaĝo, tamen pro manko de komuna lingvo por la popolamasoj plejparto de la loĝantoj de la terglobo vilaĝo estas surdmutatj unuj antaŭ aliaj. Ni urĝe bezonas solvi la lingvan problemon.

## Ĉu la angla solvos la problemon?

Multaj kredas, ke la angla lingvo jam solvis tiun problemon. Sed efektive ne. La naciaj lingvoj ne taŭgas por la definitiva solvo. Kial? Ĉar ili estas kreitaj de la koncernaj nacioj, kaj estas strikte ligitaj al la historio kaj kulturo de la koncerna nacio kaj plej taŭgas por la uzado de ĝi, sed ne por aliaj. Cetere, la naciaj lingvoj estas kreitaj senplane. Ili senescepte havas multajn neregulaĵojn kaj idiosimojn. La prononcado de la angla estas tre komplika kaj malfacila, ĝia vortaro estas mikspoto, ĝia gramatiko havas multajn neregulaĵojn. Ĝi estas tro malfacile lernebla por ni orientanoj.

Por kompreni la neadekvatecon de la angla kiel taŭga internacia lingvo, ni devas preni lecionon el la historio. Ankaŭ la greka, latina kaj franca iam ludis gravan rolon en internacia komunikado, pro la potenca influo de la greka, roma kaj franca kulturoj. Sed la greka cedis sian lokon al la latina, la latina cedis sian lokon al la franca kaj la franca cedis sian lokon al la angla. Vasta uzo de la angla ne signifas, ke ĝi estas teknike supera, sed ke Usono havas grandegan influon en diversaj sferoj. Kvankam oni energie klopodas ĝin disvastigi, tamen la rezulto estas nekontenta. Ekzemple, en Ĉinio, milionoj kaj milionoj lernas la anglan. Sed post diligenta studo dum 6, eĉ 9 jaroj, la lernantoj tamen ne povas legi kaj uzi ĝin buŝe kaj skribe. Japanaj kaj koreaj amikoj diris, ke simile estas en iliaj landoj. Cetere, la angla lingvo jam disbranciĝis. Laŭ Kent Jones el Ĉikago, ekzistas

ok grupoj de 38 dialektoj de la angla lingvo, nome: brita irlanda, aŭstralia-novzelandaj, orientazia, sudazia, afrika, karibia, kanada kaj usona anglaj lingvoj. Kiu estas la vera angla lingvo? La brita angla lingvo jam fariĝis malforta dialekto! Kaj pro malklareco de la angla lingvo en aviada komunikado eĉ okazis aviadaj akcidentoj. Franca sinjorino diris, ke ŝi studis la anglan pli ol dek jarojn, tamen ŝi ne kuraĝas paroli angle kun angloj aŭ usonanoj. Kiam alilandanoj devas komunikadi per la angla kun usonanoj aŭ britoj, ili ĉiam maltrankvilas kiel lernantoj antaŭ instruistoj. Laŭ statistiko de la aŭtoro de la artikolo *Kiu estas la vera angla lingvo?*, Britio ĉiujare enspezas 7 miliardojn da pundoj por instruado de la angla lingvo al alilandanoj. Pro la tutmonda apliko de la angla lingvo, Britio kaj Usono, kaj eĉ Kanado, Nov-Zelando kaj Aŭstralio povas profiti ekonomie. Do estas nemirinde, ke la

angloj kaj usonanoj energie disvastigas la anglan. Nederlandanoj diras, ke ili oponas kontraŭ la uzo de la angla kiel komuna lingvo en la Eŭropa Unio, ĉar ili devas pagi por la lernado de la angla, sed la britoj ne. Tio estas lingva malegaleco. Cetere, la disvastigo de la angla lingvo minacas la aliajn lingvojn per polucio, kaj malgrandaj lingvoj estas puŝataj al pereon.

## Multkultureco: vivteni naciajn lingvojn

La naciaj lingvoj estas gravaj portantoj de la naciaj kulturoj. Pereo de lingvoj signifas pereon de parto de la homa kulturo. Starigi unu nacian lingvon kiel internacian komunan lingvon signifas lingvan malegalecon, lingvan hegemonion, mortigon de lingvoj kaj pereigon de naciaj kulturoj.

La diversaj nacioj de la mondo vivas en malsamaj naturaj medioj, akiris malsamajn spertojn kaj kreis malsamajn kulturojn. La bunteco de la naciaj kulturoj estas ne nur bela sed ankaŭ valorega por la homaro. Por teni la multkulturecon de la homaro, ni devas batali kontraŭ lingva hegemoniismo.

## Ideala solvo de la problemoj

Esperanto estas ideala solvo de la internacia lingva problemoj, pro jenaj kialoj:

1. Esperanto estas neŭtrala, ĝi ne forpuŝas la naciajn lingvojn.
2. Esperanto estas laŭplane kreita. Ĝi estas fonetika kaj belsona, ĝia gramatiko simpla kaj regula, ĝia vortfarado povas ŝpari multe da tempo al la lernantoj kaj uzantoj. Ĝia vortordo estas fleksebla.

3. Esperanto estas naskita kun nobla idealo por la interkompreno, amikeco, kunlaboro kaj paca kunvivo de la homoj. Tiu ideologia aspekto de Esperanto estas tre utila al la homaro.

D-ro Zamenhof kreis Esperanton ĝuste por solvi la problemon de internacia komunikado. Tamen pro diversaj kaŭzoj lia bonega lingvo disvastiĝas malrapide kaj nur malgranda parto de la homoj ĝin uzas.

## Interreto favoras Esperanton

La kreiĝo de interreto alportis grandan oportunon por disvastigi kaj praktike uzi Esperanton.

1. Per interreto oni povas pli oportune lerni la lingvon. Por vaste instrui Esperanton, oni ne bezonas multajn klasĉambrojn kaj instruistojn.

2. Per la retpoŝto oni povas rapide kaj malmultekoste korespondi kun diverslokanoj.

3. Oni povas eldoni gazetojn per interreto.

4. Per interreto la Akademio de Esperanto fondis konsultojn interretan por respondi lingvajn demandojn kaj interŝanĝi opiniojn pri problemoj.

5. En 1999 esperantistoj de la Zamenhofa Mezlernejo en Bjalistoko sciigis min per retletero, ke la urba estraro decidis ŝanĝi la nomon de tiu mezlernejo. Por nuligi tiun decidon malfavoran al la E-movado, oni petis, ke la esperantistaro klarigu al la estraro de tiu urbo, kial oni ne devas ŝanĝi la nomon. Mi tuj leteris per e-poŝto al la urbestro de Bjalistoko kaj montris al li, ke konservo de la nomo de tiu lernejo estas bona ne nur por la urbo sed ankaŭ por la lando, ĉar la esperantistaro de la tuta mondo amas d-ron Zamenhof. Kaj la estraro de Bjalistoko fine ŝanĝis sian decidon laŭ petoj de la esperantistaro.

6. Per la helpo de interreto, oni povas faciligi turismajn aktivadojn. Ekzemple, Rudolf Burmeister, nia germana amiko, kaj lia edzino, dufoje vizitis Pekinon. Ĉiufoje antaŭ sia alveno li avertis nin pri la tempo de sia alveno kaj la hotelo, kie li loĝos, por faciligi renkontiĝi kun ni. En la jaro 1985, kiam la redakcio de *El Popola Ĉinio* celebris sian 35-jariĝon, mi gvidis turisman grupon de esperantistoj el Japanio, Hungario, Pollando, Francio, Aŭstralio, Italio kaj Britio, kaj tiu aranĝo ebligis interŝanĝon de opinioj de la diverslandaj esperantistoj. Per Esperanto oni povas organizi tian internacian turisman grupon, tre bonan por kultura interŝanĝo. Kaj interreto povas helpi en aranĝo de tia aktivado.

7. En la okdekaj jaroj, eŭropaj esperantistoj klopodis fondi Esperantan universitaton. Nun oni povas organizi Esperantan universitaton per interreto dank' al kunlaboro de diverslandaj profesoroj. La fakultatoj de la universitato povas esti starigitaj en diversaj landoj. Ekzemple, ĉinaj specialistoj pri la ĉina medicino povas fondi interretan ĉinmedician kolecion en Pekino kaj germanaj sciencistoj povas fondi kolecion pri cibernetikoj. La instruado kaj esplorado estas efektivegablaj per interreto.

8. Se komercio estas praktikebla interrete per la angla kaj aliaj lingvoj, tio eblas ankaŭ per Esperanto.

9. Estas malfacile eldoni verkon en Esperanto papere. Nun interreto ebligas al ni eldoni verkon sen bezono de granda kapitalo. En la la revuo *Esperanto* jam aperis listoj de elektronikaj E-libroj. Per interreto oni povas legi *Fabeloj de Andersen*, *Kristnaska Kanto* de Charles Dickens, *La Faraono* de Prus, *La Neĝblovado* de Puŝkin, *Imenlagon* de Storm, *Patroj kaj Filoj* de Turĝenjev kaj aliajn.

10. Interreto estas oportuna ankaŭ por aranĝi artajn, kulturajn, sciencajn kaj teknologiajn interfluojn. Por atingi rimarkindajn sukcesojn sur tiuj kampoj, oni devas fari necesajn preparojn por okazigi seriojn de tiaj aktivadoj kaj aranĝi konstantajn kunagadojn inter diverslandaj esperantistoj. Oni devas interŝanĝi spertojn pri tiaj aktivadoj kaj plivastigi la influon de la peresperanta aktivado per la gazetaro, radio, televido kaj eĉ libroj, en lernejoj kaj en societoj kulturaj, sciencaj, artistaj, literaturistaj k. s.

11. Eblas fondi internaciajn informajn servojn per Esperanto. Dank' al kunlaboro de esperantistoj kaj E-organizoj diverslandaj, oni povas uzi Esperanton en kolektado kaj dissendado de informoj por kontentigi la bezonojn de komercistoj, turistoj, artistoj kaj diversaj specialistoj. Se oni pagigos la uzantojn de la liveritaj informoj, oni povas akiri financajn rimedojn por tiaj servoj.

12. Per interreto oni povas atingi multajn retpoŝtajn adresojn kaj hejmpaĝojn. La informaj servoj de *Eventoj* k. a. senpage helpas vin en tia afero. Ekzemple, per helpo de ĝia adreso <http://www.eventoj.hu> vi povas trovi pli ol 150 retlistojn en Esperanto.

Esperanto kaj interreto estas tre bona paro. Esperanto estas la plej bona lingvo por plene utiligi la oportunon de interreto, kaj interreto estas la plej bona kampo por montri la superecon de Esperanto. Ni ankoraŭ ne sisteme esploris la eblojn. Se interreto prezentas al ni bonajn ŝancojn por montri la valoron de Esperanto, ni ne hezitu ĝin utiligi. Se la esperantistaro strebados kune, kredeble baldaŭ ni jam vidos rimarkindan progreson de nia afero.

En la lastaj jaroj ankaŭ esperantistoj en Ĉinio komencis starigi hejmpaĝojn por E-societoj kaj individuoj. Tamen la laboro iras malrapide. Ni devas pli energie klopodi por la sukceso de tiu paŝo, kiu povas fari grandan kontribuon al nia movado ne nur en nia lando, sed ankaŭ en la mondo.

*(Laŭ prelego dum la 3-a Nordorientĉina E-Kongreso en Changun)*

## La revuo Esperanto lanĉis kampanjon MEMBRO-MEMBRON!

☆☆☆

**Se ĉiu el ni akirus nur unu novan membron, UEA, do ankaŭ la legantaro de la revuo, duobligus.**

**Multaj esperantistoj membriĝus en UEA, se iu proponus tion al ili!**

☆☆☆

**La kampanjo MEMBRO-MEMBRON! estas samtempe konkurso. Ĝi daŭros ĝis la fino de januaro 2003.**

☆☆☆

Ĉiu membro de UEA, kiu akirus novan individuajn membron (en ajna kategorio), ricevos libropremion kaj lia nomo aperos en tiu ĉi rubriko.

Unu konkursanto (decidos loto) ricevos La Novan Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto. Ekzempleron de La Nova PIV ricevos ankaŭ membro, kiu akirus la plej multajn novajn membrojn.

La lotumado okazos la 10-an de februaro 2003. La rezulto aperos en la marta n-ro de la revuo.

☆☆☆

**La kondiĉoj:** bonvolu rete aŭ skribe informi la redaktoron ke vi akirus novan membron: skribu vian nomon, vian UEA-kodon, la nomon kaj la adreson de la (de vi akirita) nova membro. Post alveno de la kotizo (eblas ankaŭ donaci ĝin!) vi eniros la konkurson.

**Helpu ankaŭ vi vastigi nian komunumon!**



## Agi por la ideo

de Gunnar Fischer kaj Till Schönberner

Tre ofte ni diskutas pri la Esperanto-movado uzante sensencajn argumentojn. Tute hazarde ni legis artikolon de unu el niaj plej elstaraj E-informantoj Andrej Grigorjevskij, kiu finfine prezentas la faktan veron. Sekve restas nia tasko konkludi el ĝi konkretajn agopaŝojn. – Kiel?

En la historio de la ĝenerala E-movado oni ne trovas iujn gravajn atingojn, skribas Grigorjevskij prave. Kelkaj malsanaj cerboj nun respondus ke la transformo de planlingva projekto al vera lingvo kun propra kulturo, parolata en pli ol cent landoj, ja estas rimarkebla sukceso, des pli se oni konsideras ke ĝi reprezentas la ununuran ekzemplon de tia evoluo. Por ni tiu argumento estas tiom ridinda kaj senbaza ke ni ne plu pritraktos ĝin.

Konkretaj aferoj kiel renkontiĝoj, interhomaj rilatoj, libroj ktp. detruas la originan karakteron de Esperanto kiel pure abstrakta ideo. Tiun esencan veron Grigorjevskij sentime pretas publikigi. Plie li jam donas indikojn kiuj gvidas al la kulpantoj. Per iom da pensado oni tuj trovas ilin: temas pri la esperantistoj mem – la ordinaraĵoj mem same kiel aktivuloj! Ili tute konscie kaj intence kaŭzas la ofte konstatitan stagnon de la membrokresko.

Tion pravas la diagramo 1 kiu rezultas el niaj propraj matematikaj esploroj. Ĝi montras la membrokreskon en procento kaŭzita de unu plia membro depende de certa membronombro. Kiel tie klare videblas, surbaze de unu sola membro, aliĝo de plia persono signifas duobligon de la membronombro (centprocenta kresko!). Sed se estas jam dudek personoj tiam plia membro alportas nur kreskon de kvin procentoj. Ne imagebla kiom etas la relativa kresko ĉe organizoj kun pluraj miloj da membroj. Ĝis nun estis vaste prisilentita ke Zamenhof mem plej malgrandigis la kreskon. Antaŭ li ekzistis neniu esperantisto, kun li ekestis unu – do senlima kresko. Kompare kun ĉiuj postaj kreskoj, tio egalas al senlima kreskopendo!

Kion entute montras la statistiko? La membroj mem kulpas de la movado stagnas. Tiuj aktivuloj kiuj varbas novulojn tute klare ne interesiĝas pri ĝia kresko.



Ni nun ĉi tie ne limigas nin al kritiko, ni ankaŭ jam trovis la nuran praktikeblan vojon el tiu sakostrato. Nia solvo unue eble ŝajnas esti iom radikala, sed en ekstremaj situacioj kelkfoje nepras agi forte. Unue ni devas ekskludi la malamikojn de nia movado el ĉiuj E-asocioj! Kiel ni antaŭe vidis tio inkludas absolute ĉiujn nunajn membrojn. Grigorjevski asertas, ke neesperantistoj pli bone kaj pli trafe kapablas informi pri Esperanto ol esperantistoj mem. Kiu serioze povus pridubi la universalan validecon de tiu frazo? Tial ni plie strikte malpermesu la uzon de Esperanto al ĉiuj homoj en la mondo. Tio nur estas logika konsekvenco, ĉar nur tiumaniere finfine ekzistas entute bona informado pri Esperanto (nome fare de la neesperantistoj).

Dua paŝo devas esti konstanta kresko de la movado. Ni tie orientiĝu je la pioniraj jaroj kaj alstrebu centprocentan kreskon.

En la unua jaro ekzakte unu persono membrigas. Ĉiujaran duobligon de la membronombro ni sekve atingas se ni aligas unu personon en la dua jaro, du en la tria jaro, kvar en la kvara jaro, ok en la kvina jaro, ...

Laŭ tiu vojo ni povas garantii centprocentan kreskon por la ontaj dek tri jaroj. Post tiu tempo ni denove eljetu ĉiujn membrojn (krom unu) por denove atingi pionirajn kondiĉojn. Per tio ni samtempe batalas kontraŭ la troa realiĝo de Esperanto kaj savas ĝian ideocon. Nun povas reeki la centprocenta kresko.

Ni jam pensis pri konkreta aplikado de nia plano kaj rekomendus ĝian tujan komenciĝon en la jaro 2003. Tiel ni povas jam en la sekva jaro bonvenigi la unuan membron kaj havos inter 2004 kaj 2017 konstantan centprocentan kreskon de niaj membroj (vidu diagramon 2). Konklude: Por ĝui la oportunaĵojn respektive stagnon de E-realo oni varbu novajn membrojn. Por tutmonde agi por la E-ideo necesas membrokresko laŭ nia plano.



## Kaj tamen la Tero turniĝas!

D-ro T. Pumpr

Teda sed instrua traktato, per kiu la distranĉita Gordia nodo denove implikiĝas. **Moto:** *La patro donis al la infanoj po unu pomo. (Freneziga proverbo.)*

La supra frazo ne plaĉas al Kalocsay. Ĝi ŝajnas al li stumpa, ĉar mankas en ĝi rekta objekto en akuzativo, kiun postulas la transitiva verbo. Tial li konsilas meti la distribuatan substantivon ĉiam en akuzativon, kaj laŭ logikaj rezonoj, kiujn li detale priskribis, en akuzativon pluralan. Do la frazo tekstas laŭ Kalocsay jene: *La patro donis al la infanoj po unu pomojn*. Li asertas, ke la pekulo, kiu konfuzas la kapon de la gramatikistoj, malinklinaj uzi pluralon post unu, estas la numeralo, kiu kondukas *duvizaĝe*: Rilate al la substantivo ĝi rolas adjektive (*unu pomo*), rilate al la prepozicio ĝi rolas substantive (*po unu*). Mi volas elprovi la portkapablon de ĉi tiu teorio.

1. Unue mi skribas jenajn frazojn: *La filoj heredis po unu ĉevalojn – po du ĉevalojn – po kelkaj ĉevalojn – po pluraj ĉevalojn – po multaj ĉevalojn*. Brave, bravissime, krias la akuzativistoj, dum la nominativistoj estas iom konfuzitaj, sed silentas sub la forto de la argumentoj de Kalocsay.

2. Nun mi iom modifas la frazojn, alroĉante al la pekema numeralo ankoraŭ alian kvantindikan esprimon: *La filoj aĉetis po unu korbojn da pomoj – po du vagonojn da pomoj*. Ankoraŭ brave, ĉu? La pli kuraĝaj el la nominativistoj dubas, ĉu la filoj vere aĉetis korbojn da pomoj, ĉiuj po unu. Ili asertas, ke la korboj restis proprajo de la legomisto kaj ke la filoj aĉetis nur pomojn, ĉiu po unu korbo. Sed mi estas grandanima kaj diras, ke en la gramatiko oni ne povas ĉiam argumenti per logiko.

3. Mi denove modifas la frazojn, nun tute ellasante la pekeman numeralon kaj anstataŭigante ĝin per *sennumerala kvantindiko*: *La filoj aĉetis po korbo da pomoj*. Sed kie estas nun la rekta objekto montrenda per akuzativo? Ĉu mi ellasu la prepozicion *da*? Mi tion provas: *La filoj aĉetis po iom pomojn – po tutaj vagonoj pomojn – po multaj vagonoj karbon (singularo!) – po amaso varojn – po paro ŝuojn. Ili heredis po duopo ĉevalojn – po paro ĉevalojn – po miliono dolarojn. La bona onklino adiaŭis, doninte al ni po kelkfoja kisojn – po kelkoba kisojn*. La bravo-krioj silentiĝis, sur la kapo de pluraj legintoj hirtiĝis la haroj kaj aŭdiĝis protesta murmurado. Nur la malmolkapaj akuzativistoj favore kaj entuziasme klarigas: *Tiuj frazoj estas tute korektaj. Se oni povas diri, ke la filoj aĉetis ŝuojn, ĉiu po unusola paro, ni povas la kvantindikon ankaŭ antaŭmeti kaj diri, ke ili aĉetis (po unusola paro) ŝuojn*. Estante tolerema viro, mi ne objetos, ke neadverba adjekto (prepozitivo), precipe longa (ĉi tie la esprimo *po unusola paro*), staras ordinare post la objekto kaj ne antaŭ ĝi (ĉi tie la vorto *ŝuojn*). Mi nur montras al la Plena Gramatiko, § 400.

4. Mi faras plian paŝon, jam la lastan: Mi tute eljetas la vorton de la kvantesprimo, subkomprende ĝin el la singularo: *La filoj heredis po ĉevalo – po ĉevalparo – po ĉevalduopo – po ĉevaltrio – po ĉevala dujunaĝo. La bona onklino adiaŭis doninte al ni po kiso – po kelkfoje ripetita ŝmaca kiso. La saĝa reĝo starigis en la pordojn de sia kastelo po kuraĝa soldato kun halebardo. Mi vetas, ke nun eĉ la plej ortodoksaj akuzativistoj ne eltordos el ĉi tiuj frazoj akuzativon (sen paroli pri akuzativo plurala), krom ke ili rompuz la premison kaj subŝovus tien la numeralon unu. Sed mi apelacias al la esperantista publiko kaj proponas, ke oni voĉdonu, ĉu ĉi tiuj miaj ekzemploj estas klaraj, logikaj kaj korektaj, aŭ ne. Kaj se oni jesos, do jen la konkludo:*

La teorio pri la plurala akuzativo post distribua prepozicio PO ne estas kontentiga, ĉar ĝi ne solvas ĉiujn kazojn.

Mi kompreneble ne volas nur detru. Kondamninte unu teorion, mi devas prezenti alian, pli taŭgan. Tiu mia estas tre simpla, sed mi rakontos ĝin iom larĝvorte: Estas konata afero, ke Zamenhof prunteprenis la prepozicion PO el la slavaj lingvoj. Ĝi ekzistas ankaŭ en la ĉeĥa. Kaj tie la afero pri PO statas tute same, kiel en Esperanto. Oni diras ekzemple:

Ĉeĥe: *Otec jim dal jablko* (singulara akuzativo).

Esperante: *La patro donis al ili pomon* (singulara akuzativo).

Ĉeĥe: *Otec jim dal po jednom jablku* (singulara prepozitivo, ne plurala akuzativo).

Esperante: *La patro donis al ili po unu pomo* (singulara prepozitivo, ne plurala akuzativo).

Leginte la fervoran argumentadon de Kalocsay por plurala akuzativo post PO, mi demandis min mem, kial ni ankaŭ en la ĉeĥa lingvo ne havas post PO pluralan akuzativon. Mi prezentis tiun problemon al la Lingva Instituto de la Ĉeĥa Akademio de Sciencoj petante klarigon, kien malaperis la rekta objekto, nome la akuzativo post la transitiva verbo *doni*, kiam oni uzis la distribuatan prepozicion PO. Kaj afabla profesoro min instruis jene:

Post la transitivaj verboj staras la objekto kutime en akuzativo, sed ne ĉiam. Povas ĝin esprimi ankaŭ tuta frazo (*Mi vidas, ke pluvas*), aŭ infinitivo (*Mi vidas pluvi*), aŭ mezurindika adjekto (*Mi havas malmulte da pano*). Speciala kazo estas, se tiu mezurindika adjekto estas prepozitivo kun la distribuata PO. Tiam la rektan objekton rolas la tuta PO-komplekso, ne nur la substantivo, same kiel la tuta esprimo *malmulte da pano* estas rekta objekto de la verbo *mi havas*.

△ Kaj la afabla akademiano elŝutis amason da citaĵoj el la literaturo, gramatikoj kaj sintaksaj traktatoj. Mi koncedas, ke la Ĉeĥa Akademio ne estas kompetenta pri Esperanto, sed la ĵus nomita teorio ŝajnas al mi tre taŭga, ĉar ĝi estas simpla kaj konsekvenca kaj solvas ĉiujn eblajn kazojn. Kaj ĝi ne estas tute fremda al Esperanto, vidu Plenan Gramatikon, § 306, Rim. II.

Kompreneble oni povas ankaŭ en la ĉeĥa lingvo turni la frazon alimaniere kaj diri ekzemple: *La patro donis al la infanoj pomojn, al ĉiu po unu.* Sed tiam temas pri tute aliaj frazoj. Oni ankaŭ ne povas la esprimon *al ĉiu po unu* meti antaŭ la akuzativ-objekton, sed ĉiam nur postmeti ĝin.

La ĵus prezentita teorio povas esti aplikata ankaŭ ĉe la kvantesprimoj kun la prepozicio ĈIRKAŬ. La respektiva ĉeĥa frazo tekstas ekzemple en laŭvorta traduko: *Mi vidis tie ĉirkaŭ ducent homoj.* Ne estas tie akuzativo, sed simple prepozitivo, kaj ĉi tiu **tuta** mezurindika adjekto (*ĉirkaŭ ducent homoj*) rolas kiel objekto post transitiva verbo (*mi vidis*). Simila estas la afero pri la kvantesprimoj kun SUPER kaj ĜIS. Ni do vidas, ke ankaŭ nominativo estas ĉi tie defendebla.

Sed ni povas ĉi tiujn vortojn ĈIRKAŬ - SUPER - ĜIS opinii ankaŭ adverboj (Plena Gramatiko diras: pseŭdoadverboj), kaj tiam sekvas post ili la akuzativo: *Mi vidis tie ĉirkaŭ - super - ĝis - ducent homojn*, same kiel en la frazo: *Mi vidis tie preskaŭ - plus-minus - pli-malpli - pli ol - almenaŭ - minimume - maksimume - proksimume ducent homojn.*

Tiel la teorio pri sekvoj de **duvizaĝa** funkciado de la numeraloj (kiu cetero en unu kazo rifuzas servi) fariĝas nebezona.

Mi finas vokante al ĉiuj kvar ventoj la obstinan konfeson de Galileo Galilei pri la tero, kiu tamen moviĝas, eĉ se la aŭtoritato dekretris alimaniere: *Eppur si muove!* Tamen la nominativo!

Per tio mi adiaŭas al la afablaj kaj paciencaj legantoj kaj sendas al ĉiuj samsentaj nominativistoj po sincera saluto, kaj al la plural-akuzativistoj po unu bonajn noktojn.

*Laŭ retrovita letero el la jaro 1948 de T. Pump, aĝredita al la redakcio de Literatura Mondo (sed rifuzita de la redaktoro K. Kalocsay). Retajpis J. Werner*

# NAVIGE

## Tra TTT-paĝoj

Jen pluraj verdaj gutoj el la inform-oceano de Tut-Tera Teksaĵo. Sciigu nin pri pluj konsultindaj paĝoj Esperanta!



### LANDOJ, REGIONOJ

**Senlime** (E-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno) enhavas informojn pri Esperanto, historio, E-kurso, turismo, ret-versio de la informilo *Senlime*: <http://www.ping.be/jrjmsenlime>.

**Estona E-Asocio** havas novan retpaĝon <http://www.esperanto.ee>

**E-Asocio de Irlando** havas novan ejon aldonan al tiu anoncita en majo 2001: <http://www.esperanto.ie>

**Biblioteko de la Fondaĵo Auschwitz:** ĝeneralaj informoj en Esperanto troviĝas ĉe: <http://www.auschwitz.be/biblio/?lg=esperanto>, kun same esperantlingva serĉilo por ties katalogo.

**Perslingvaj informiloj** en formato PDF: [http://groups.yahoo.com/group/irana-Esperanto-Centro/files/Perslingvaj\\_Informiloj](http://groups.yahoo.com/group/irana-Esperanto-Centro/files/Perslingvaj_Informiloj)

### KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ

**Plena kalendaro de E-aranĝoj**, ĉiumonate aktualigata: <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>

### LITERATURO, TEKSTOJ

**Tipografitaj fabelkajeroj** prezentantaj tiparojn de Franko Luin estas legeblaj, elŝuteblaj kaj donace sendeblaj al amikoj ĉe <http://www.omnibus.se/espix/esp.htm>

**Serĉoj daŭre abundas** ĉe <http://groups.yahoo.com/group/E-anekdotoj> (nomo kaj adreso ŝanĝitaj post ĝia anonciĝo en nov. 2000)

### ARTO, MUZIKO

**E-muzikspektaklo** bazita sur la vivo de Sankta Francisko el Asizo: <http://space.tin.it/it/pcinquan/venu.htm>

**E-traduko de la "Manifesto de ERBEFOLE"** (eksperimenta franca artkomunumo): <http://erbefole.free.fr/manifeste-eo.htm>

### SANO

Granda vegetarisma/vegetalisma manifestacio en Parizo aldonis E-on al naŭ aliaj lingvoj: <http://www.veggiepride.org/esp/index.htm>

### DISSENDOLISTOJ

La longe ekzistanta novaĵgrupo [www.mailgate.org/soc/soc.culture.esperanto/index.html](http://www.mailgate.org/soc/soc.culture.esperanto/index.html) kaj ankaŭ ĉe <http://groups.yahoo.com/group/esperanto-l>

### DIVERSAJ:

**Greziljono:** dank' al la laboro de Dominique Cardon, la programo kaj aliaj informoj pri la Kulturdomo denove estas konsulteblaj sur la reto je adreso: <http://greziljono.kastelo.free.fr/indekso.htm>

**Esperanto-Panorama** translokigoj al nova loko por pli efike reklami pri Eo. Ĝuu panoraman vidon de la tuta Esperantujo: <http://esperanto-panorama.net/>

Roy McCoy

**Interretajn novaĵojn bv. sendi al <navige@co.uea.org>**

# Kalendaro 2002-2003



**Malgraŭ zorga kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garanti la fidindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la marta numero.**

## novembro

**15-17: 10-a Kongreso de ĈEA** ligita al solenaĵo omaĝe al 100-jariĝo de la E-klubo en Prago, Ĉeĥio. ĈEA, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, CZ-29001 Poděbrady, Ĉeĥio. ☎+420-324-615651. ☐ cea.polnický@quick.cz.

**16-17: Ĝenerala kunveno de JES** - Junularo Esperantista Svisa en Basel. Ĉ Vera Pochanke, Lettenstr. 70, CH-9500 Wil, Svislando. ☎+41 32 9143078, ☐ belisle@span.ch

**23: 4-a EFIFO** - Esperanta Filmfestivalo en Bratislava, Slovakio. ☐ Nataša Šandorová, Záhrebská 4, SK-81105 Bratislava, Slovakio. ☎+421 2 52494587, ☐ natasa.sandorova@nextra.sk

## decembro

**06-08: Kultura Semajnfino en Homburg**, Germanio. ☐ Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL). ☐ Ercmontara.EC@t-online.de

**07: 22-a ĈESAT - Ĉeĥa-Saksa Tago** en Ŭstí nad Labem, Ĉeĥio. ☐ Miroslav Smyčka, Kojetická 90, CZ-400 03 Ŭstí nad Labem, Ĉeĥio. ☎+420 47-5532417.

**10-15: Unu jarcento de Esperanto** tra la verkoj de Valo, Bouresse, Francio (gvidas Thérèse Pinet kaj Georges Lagrange). ☐ Kvinpetalo, Esperanto-Centro, FR-86410 Bouresse, Francio. ☎+33-(0)549428074. ☐ kvinpetalo@club-internet.fr

**12-15: 20-aj Krakovaj E-Tagoj** en Pollando. ☐ Krakova Societo Esperanto, Krasickiego 18-20, PL-31-515 Krakow, Pollando.

**12-16: 22-a Rusia E-Kongreso** en Moskvo. ☐ Rusia Esperanto-Uniĝo, pk. 57, RU-105318 Moskva, Rusio. ☐ esperanto@au.ru

**13-15: Kulturaj tagoj rememore al Zamenhof** en Braŝov. ☐ Jolanda Józsi, str. Brândușelor 92 bl. 41A sc. C ap.33, et.8, RO-2200 Braŝov, Rumanio

**14: AEROB - Antaŭkristnaska E-renkontiĝo en Vieno** okaze de naskiĝtago de Zamenhof. ☐ Esperanto-Societo, Alicia Komlóšiová, Rovníková 6, SK-821 02 Bratislava, Slovakio. ☎+421-02-43291604. ☐ balaz12@post.sk

**14-15: Zamenhofaj Tagoj, Odessa.** ☐ Esperanto-Klubo "Verdaĵo", a.k. 71, UA-65026 Odessa, Ukrainio. ☐ zoo@te.net.ua

**15: Zamenhofa tago 2002**, renkontiĝo de esperantistoj ĉe DLF "La Pineta", proksime al la stacidomo de Verona PN. ☐ Fervojista Esperanto-grupo, Enrico Molesini, ☐ molesini@tin.it

**24: Kristnaska-Novjara E-Feriado**, Karlovo. ☐ B. Leonov, Esperinform, p. k. 44, BG-4300 Karlovo, Bulgario. ☎+359-335-3933. ☐ leonov@rozabg.com

**27 dec-03 jan:** Novjara Renkontiĝo apud Berlino. ☐ EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, DE-10551 Berlin, Germanio. ☎+49-30-6 85 58 31. ☐ +49-30-68 05 70 11. ☐ Lu@EsperantoLand.org, <http://www.EsperantoLand.org/eo/mr.html>

**27 dec-03 jan: 19-a Internacia Festivalo**, (aranĝo por familioj kaj personoj 25 - 55 jaraĝaj) en kastelo Borken, Germanio. ☐ Hans-Dieter Platz, postfach 1148, DE-34303 Nidenstein, ☎+49 56 24 80 07, ☐ HDP@internacia-festivalo.de, [www.internacia-festivalo.de](http://www.internacia-festivalo.de)



La kastelo Borken en Germanio

**27. dec - 03. jan: 46-a Internacia Seminario** (junulara aranĝo) en Trier. ☐ Martin Sawitzki, Max-Plack-Ring 8d/L 56, DE-98693 Ilmenau, Germanio. ☎+49-3677-844505. ☐ admin@esperanto.de, [www.internacia-seminario.de](http://www.internacia-seminario.de)

## 2003

## januaro

**03-06: Poludnica** - Vintra grimpadaj kaj renkontiĝo de esperantistoj-vojaĝantoj en Liptovský Ján, Slovakio. ☐ Esperanto-MEL, P.O.Box B-152, SK-012 01 Žilina, Slovakio. ☎+421 903 552152, ☐ gondzur@urap.sk

**04-11: 44-a Internacia Fervojista E-Skiesemajno** en Kunčice pod Ondřejkem, Ĉeĥio. ☐ Ladislav Láni, U cukrovaru 12, CZ-78371 Olomouc, Ĉeĥio. ☎+420 77 6792441, +420 68 5511145, ☐ fervoja.turismo@pvt.net.cz

**05-17: 19-a Aŭstralia Somerkursaro de Eo** en Melbourne. ☐ Jennifer Bishop, AEA, PO Box 6, Monash University, AU-Victoria 3800, Aŭstralio. ☎61 3 9818 7358, ☐ 61 3 9905 3668, ☐ esperanto@education.monash.edu.au

## februaro

**08-16: Seminario pri agado pri infanoj** kaj por infangvidantoj de Internaciaj Infanaj Kongresetoj en Lesjöfors (Svedio). ☐ David-Emil Wickstroem, ☐ wicki@gmx.at

**18-22: Praktikado de la lingvo** por infanoj kaj plenkreskuloj, 1-a nivelo: Marie-Hélène Sautet, 2-a nivelo: Juanita Turbillon en Bouresse. ☐ Kvinpetalo (v. 10 dec).

**25 feb - 01 mar: Preparado al kapableco**, skriba kaj parola kun Georges Lagrange en Bouresse. ☐ Kvinpetalo (v. 10 dec).

## marto

**14-21: Nacia Kongreso de FFEA** (Franca Fervojista Esperanto-Asocio) en Collonges-la-Rouge. ☐ Sylviane Lafargue, 8 bis Av Anatole France, FR-94600 Choisy-le-Roi, Francio. ☎+331-48-530552 aŭ +332-43-211639

**30 mar - 01 apr: Aprilaj ridetoj**, Odoso, Ukrainio. ☐ Tatjana Auderskaja, ul.Korolenko, 5b-26, UA-65100 Odosso-100., ☐ zoo@te.net.ua

## aprilo

**14-18: Inicado kaj praktiko de ĵogo** kun Arlette Plutniak kaj samtempe Katalin Kováts en Bouresse. ☐ Kvinpetalo (v. 10 dec).

**16-22: Internacia Junulara Festivalo**, IJF. ☐ ijf.admin@esperanto.it

**19-21: 58-a Kongreso de SAT-Amikaro** en Cap d'Agde. ☐ SAT-Amikaro, 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris, Francio. ☎+33-(0)147978705, ☐ +33-(0)147977190. ☐ satesper@noos.fr

**26: Turisma renkontiĝo** en Zochova chata (Červený Kameň), Slovakio. ☐ Esperanto-MEL (vidu 03 jan).

**29 apr - 03 maj: Problemoj lingvosciencaj kaj gramatikaj** en la nova eldono de PIV kun Michel Duc Goninaz en Bouresse. ☐ Kvinpetalo (v. 10 dec).

## majo

**01-05: 7-a Nacia Kongreso de Esperanto** en Kuernavako, temo: *Promesoj kaj deĵoj de nia dua jarcento*. ☐ Meksika Esperanto-Federacio, ☐ 7nke@esperantomex.org

**01-11: Aroma Jalto**, ☐ Volodimir Hordijenko, p.k.35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio, ☐ volodimir\_h@ukr.net

**08-11: Stellan Engnhom kaj la Malgranda Revuo** (1943-1952) kun Johano Rapley en Bouresse. ☐ Kvinpetalo (v. 10 dec).

**10-16: 55-a Kongreso de IFEF** (Internacia Fervojista E-Federacio) en Dresden, Germanio. ☐ Postfach 100425, DE-61144 Friedberg, Germanio. ☎+49 60314617, ☐ 55a-IFK@web.de

**16-19: Wuhu-a Internacia Tea Foiro** (Esperanto kiel pontolingvo) kun samtempa Salikoka kaj Biera Festivaloj kaj E-Simpozio pri turismo en Hefei. ☐ Liu Jianguo, direktoro de

# Furoraĵoj de la Kongresa Libroservo

Titolo	Vendo-kvanto	Prezo (EUR)
--------	--------------	-------------

1. Vocabulário de bolso (E.M. Machado)	160	3,00
2. Diccionario de bolsillo (J. Paluzie-Borrell)	80	6,00
3. Vojaĝo en Esperanto-lando (B. Kolker)	54	18,00
4. Baza Esperanta Radikaro (W.Pilger)	50	7,50
5. Tom Jobim en Esperanto (kompakt-disko)	45	12,00
6. Doña Bárbara (R. Gallegos)	7	4,80
7. Nova aŭtoro (A. Glaser)	33	6,60
8. Internacia Kongresa Universitato 2002	31	7,80
9. Esperantaj sinonimoj (J. Ojalo)	30	7,20
10. Espirimo de sentoj en Esperanto (E. Privat)	30	6,00
11. Fundamenta krestomatío (L.L. Zamenhof)	30	2,30
12. Hejma vortaro (red. J. Lindstedt)	30	7,50
13. La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto	30	78,00
14. Unuiĝintaj Nacioj: Venu kun mi! (N. Annan)	29	4,80
15. O desafío das línguas (C. Piron)	26	15,00
16. Pasporta servo 2002	25	15,00
17. Nova Esperanta krestomatío (W. Auld)	24	12,30
18. Lingvistikaj aspektoj de Esperanto (J.Wells)	20	5,70
19. Vivo de Zamenhof en bildoj (H. Thien)	20	12,00
20. Zamenhof bildrakonte (G. Tilleux)	20	6,90

Dum la 87-a UK en Fortalezo oni vendis librojn kaj aliajn varojn por suma valoro de preskaŭ 33 000 eŭroj, malgraŭ la fakto, ke pli ol duono de la tie disponeblaj 1 200 titoloj estis forte rabatitaj. Oni sukcesis lastmomente aldoni al la ŝipa sendaĵo nur 30 ekz. de la La Nova PIV (kaj tuj vendis ĉiujn; oni certe vendus pli).

Hefei Verdstelo Esplora Instituto pri Turismo, Langyashan Lu, Changhuai Xincun, B-Qu 3-105#, CN-230011, Hefei, Ĉinio. ☎ +86-551-4484370, ✉ +86-551-4210414, 📧 yjs00815@mail.hf.ah.cn

**19-25: Internacia Esperanto-konferenco de OSIEK** en Prago. Temo: *Intimaj temoj en Esperanto-beleto*. ☑ KAVA-PECH (v. 10 sep).

**19-26: Internacia Junulara Kongreso** en Lesjófors. La temo: *Al Libera Kulturo* (ALKO). ☑ TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-2015 BJ Rotterdam, Nederlando. ☎ +31-10-4361044. ☒ oficejo@tejo.org, ijk, aŭ kunordiganto@tejo.org. La aliĝilo elŝuteblas ĉe: <http://www.tejo.org/ijk/2003/>.

**23-26: La 85-a Brita (kaj Skota) E-Kongresoj** en Glasgovo, Skotlando. ☑ EAB, Esperanto House, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffordshire ST12 9DG, Britio. ☑ Geoffrey Sutton <gsutton@macnlimited.net>.

**29 maj - 01 jun: Botaniko:** observado en la naturo kaj terminologio kun Philippe Pellicier en Bouresse. ☑ Kvinpetalo (v. 10 dec).

**29 maj - 01 jun: Komunaj radikoj de la E-movado kaj Bahaismo,** seminario. ☑ Esperanto-Societo Zuriko, Akazienstrasse 6, Postfako 858, CH-8034 Zuriko, Svislando. ☎ +41-(0)1-2515025, fakso: +41-(0)1-2610479. ☒ admin@esperanto.ch, www.esperanto.ch/kalendaro.



## junio

**15: Ĉeĥa, pola kaj slovakaj turisma renkontiĝo** sur la montopinto Cantorio. ☑ Esperanto-MEL (vidu 03 jan).

**17-25: 25-a Ĉebalta Esperantista Printempo** en Mielno. ☑ Pola Esperanto-Asocio, skr. poczt. 30, PL-75-016 Koszalin, Polio. ☎ +48-503-417825. ☒ barslavo@poczta.net.aŭ barsalvo@wp.pl

**21: Esperanto-bazaro** en Dunajská Streda, Slovakio. ☑ OSES (v. 08 mar).

**23 jun - 06 jul: 37-a Internacia E-Feriado** en Miedzygorze. ☑ Silezia Esperanto-Asocio, str. Dubois 3/1, PL-50-208 Wrocław, Pollando. ☎ +48-71-3296954, 📧 vroclavo@poczta.onet.pl

## julio

**01-07: 38-a Brazilia Kongreso de Esperanto** en Belo Horizonte/MG, Brazilio. ☒ ariknub@ig.com.br

**05-06: Estero** en Ukrainio. ☑ Viktor Pajuk, Mikola Kriveckij, p.k.83, UA-01133 Ternopil-1, Ukrainio. ☒ elena@pajuk@undp.org

**08-12: Radiafonia teatraĵo kun realigo de kompakta disko** kun Serge Sire, Georges Lagrange en Bouresse. ☑ Kvinpetalo (v. 10 dec).

**12-18: 76-a Kongreso de SAT** (Sennacieca Asocio Tutmonda) en La Chaux-de-Fonds, Svislando. ☑ Kultura Centro Esperantista, Case Postale 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds. ☎ 032-9267407.

**15-19: Realigo de bildrakontoj** kun Serge Sire en Bouresse. ☑ Kvinpetalo (v. 10 dec).

**15-20: 62-a Kongreso de Esperanto kaj 13-a Internacia Esperanto-Kongreso** en Valencia (100-jara jubileo de hispana kaj valencia asocioj). ☑ Augusto Casquero, Avenida Burjasot 29; A-31, ES-46009 Valencia, Hispanio. ☒ augustocasquero@infonegocio.com

**19-24: IBIRE 03,** Internacia biciklista renkontiĝo en Dobřichovice, Ĉeĥio. ☑ KAVA-PECH (v. 10 sep).

**19-25: Internacia Esperanto-konferenco de OSIEK** en Prago. Temo: *Intimaj temoj en Esperanto-beleto*. ☑ KAVA-PECH (v. 10 sep).

**19-26: Internacia Junulara Kongreso** en Lesjófors. La temo: *Al Libera Kulturo* (ALKO). ☑ TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, NL-2015 BJ Rotterdam, Nederlando. ☎ +31-10-4361044. ☒ oficejo@tejo.org, ijk, aŭ kunordiganto@tejo.org. La aliĝilo elŝuteblas ĉe: <http://www.tejo.org/ijk/2003/>.

**23-26: La 85-a Brita (kaj Skota) E-Kongresoj** en Glasgovo, Skotlando. ☑ EAB, Esperanto House, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Staffordshire ST12 9DG, Britio. ☑ Geoffrey Sutton <gsutton@macnlimited.net>.

**29 maj - 01 jun: Botaniko:** observado en la naturo kaj terminologio kun Philippe Pellicier en Bouresse. ☑ Kvinpetalo (v. 10 dec).

**29 maj - 01 jun: Komunaj radikoj de la E-movado kaj Bahaismo,** seminario. ☑ Esperanto-Societo Zuriko, Akazienstrasse 6, Postfako 858, CH-8034 Zuriko, Svislando. ☎ +41-(0)1-2515025, fakso: +41-(0)1-2610479. ☒ admin@esperanto.ch, www.esperanto.ch/kalendaro.



**22-26: Inicido al Esperanto,** metodo Freinet kun Mariette Bernardin kaj Praktikado de la lingvo, 2-a nivelo en Bouresse. ☑ Kvinpetalo (v. 10 dec).

**26 jul-02 aŭg: 88-a Universala Kongreso en Gotenburgo.** ☑ Universala Esperanto-Asocio (v. kolofono).



## aŭgusto

**Komence de aŭgusto** (precizigota): **Ekspe-dicio Dnestro-2003**, delto de la rivero Dnestro en Ukrainio. ☑ Junulara E-klubo, Tatjana Auderskaja, ul. Korolenko, 5b-26, Odesso-100, UA-65100 "Verdaĵo", ☒ zoo@te.net.ua

**12-16: Pri muziko kaj Praktikado de la**

**lingvo** kun Anne-Sophie en Bouresse. ☑ Kvinpetalo (v. 10 dec).

**19-23: Preparado al altaj studoj,** skriba kaj parola parto kun Janine Dumoulin, Georges Lagrange en Bouresse. ☑ Kvinpetalo (v. 10 dec).

**23: 7-a Internacia "Esperanto" Tablotenis-konkurso.** ☑ Katalin Faragó, pk. 89, HU-6801 Hódmezővásárhely, Hungario. ☒ konyv@korhaz.hodtav.hu aŭ esp-med@freemail.hu

**24: Hoverlano** en Karpatoj, Jaroslav Zaharija, B. Ĥmelnickij str. 82/4-8, UA-76006 Ivanovo-Frankivskij.

**27-31: 71-a Itala Kongreso de Esperanto,** Ancona - Portonovo. ☑ Gruppo Esperantista Marchigiano "La Verda Pego", Casella Postale n. 521, Ancona, Italio. ☒ menghini.marco@libero.it

**27 aŭg - 02 sep: 21-a Ĉina Templo Foiro** de Jiuhua monto, Sanktejo de Budhismo, kun Eo kiel pontolingvo. ☑ Hefei Verdstelo-Esplora Instituto (v. 16 maj).

**30 aŭg - 06 sep: 16-a Ekumena Kongreso** (56-a de IKUE, 53-a de KELI) pri la temo *Viestas miaj atestantoj - salo kaj lumo por la mondo* en Rimini, Italio. ☑ Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, DE-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio. ☒ b.eichkorn@t-online.de aŭ <http://www.ikue.org>.

## septembro

**05-12: Instruado kaj vivo de Andreo Cseh** kun provelcionoj de la kurso kun Ed Borsboom en Bouresse. ☑ Kvinpetalo (v. 10 dec).

## oktobro

**01-02: 4-a Hefei-konkurso pri drakboatado** kun Eo kiel pontolingvo en Hefei, Ĉinio. ☑ Hefei Verdstelo-Esplora Instituto (v. 16 maj).

**24-31: Praktikado de la lingvo** en Bouresse. ☑ Kvinpetalo (v. 10 dec).

## novembro

**01-02: 14-a Kongreso de UkrEA,** Kijiv. ☑ Volodimir Hordijenko, p.k.35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio. ☒ volodimir\_h@ukr.net

## decembro

**10-15: Zamenhofa semajno** en Bouresse. ☑ Kvinpetalo (v. 10 dec).

**14-15: Zamenhofaj tagoj,** Odeso, Ukrainio. Tatjana Auderskaja, ul. Korolenko, 5b-26, Odesso-100, UA-65100, rete zoo@te.net.ua

**27 dec - 03 jan: 20-a Internacia Festivalo** (aranĝo por familioj kaj personoj 25 - 55 jaraĝaj) en Münster. ☑ Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio. Tel/fakso: +49-5624-8007, portebla +49-171-4964558. Rete: HDP@internacia-festivalo.de

## ABONTARIFOJ 2003

### de la Libroservo De UEA

(prezaj en eŭroj)

Revuo	n-roj jare	jara abono
Boletín (hispana)	5	28,00
Brazila Esperantisto (aere)	4	18,00
Bulgara Esperantisto	4	12,00
Debrecena buleteno (beletra, movada)	6	13,50
Dia Regno (KELI, aere)	6	18,00
Esperantisto Slovaka	4	20,00
Esperanto aktuel (germana)	6	20,00
Esperanto (revuo de UEA)	11	*32,00
Esperanto, L' (itala)	9	26,00
Esperantolehti (finna)	6	15,00
Esperanto sub la Suda Kruco (aŭstralia-novzelandaa, aere)	6	24,00
Espero Katolika (IKUE)	6	29,50
Espero, La (sveda)	6	20,00
Fonto (literatura, aere)	12	35,00
Gazeto, La (kultura)	6	28,00
aerpoŝta aldono		4,00
Heroldo de Esperanto	17	30,00
aerpoŝta aldono		12,50
ICEM-Esperanto (Freinet-pedagogio)	4	18,30
Informilo por Interlingvistoj	4	6,80
Internacia Pedagogia Revuo	4	18,00
Jaro, La (agendo, aere)	1	6,00
Juna Amiko (por lernejoj)	4	12,00
Kancerkliniko, La (ajnista)	5	20,00
aerpoŝta aldono		3,00
Komencanto (facila, amuza, instrua)	6	15,00
Kontakto (revuo de TEJO)	6	*19,00
Kosmos (filozofia)	2	8,00
Language Problems and Lang. Planning institucioj	3	58,00
Literatura Foiro	6	28,00
aerpoŝta aldono		9,00
Litova Stelo	6	14,00
Medicina Internacia Revuo (aere)	3	13,60
Monato (novjmagazino)	12	44,00
aerpoŝta aldono		5,00
(reta versio)		26,40
Monde de l'espéranto, Le	6	30,50
Norvega Esperantisto	6	11,50
Ondo de Esperanto, La	11	25,00
aerpoŝta aldono		4,00
Oomoto (religia/kultura, aere)	2	13,80
Scienco kaj kulturo	6	30,00
Sennaciulo/Sennacieca revuo	12	55,00
Simpozio (filozofia)	2	9,00
Starto (ĉeĥa)	4	9,00
TEJO tutmonde	4	10,00
Tempo (kroata)	4	11,40

\* Abonprezoj de UEA-revuoj varias laŭlande. Konsultu la kotiz-tabelon de UEA.

Por ĉiuj gazetoj la abonantoj en Eŭropa Unio aldone pagas la imposton de 6%.



# BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2003

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn por la 54-a fojo. La rezultoj oni anoncos en la 88-a Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne limigita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, antaŭe ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

**Poezio:** Maksimuma longo ne fiksis. Tri premioj.

**Prozo:** Maksimuma longo 200x65 tajpospacoj. Tri premioj.

**Teatraĵo:** Maksimuma longo ne fiksis. Tri premioj.

**Eseo:** Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la UK, "Lingvaj rajtoj kaj respondecoj". Premio: "Luigi Minnaja" kaj du aliaj premioj.

**Kanto:** Teksto kaj melodio povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio "Ahn Song-san" kaj du aliaj premioj.

**Vidbendo:** Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongrestemo. Daŭro inter 15 kaj 60 min. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

**Infanlibro de la Jaro:** Originala aŭ tradukita libro (alia ol lernolibro), presforme aperinta en 2002. Unu premio.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 2003. Por vidbendo oni sendu po unu ekzemplero ĝis la 1-a de julio 2003. Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La veraj nomo kaj adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkuras.

**Premioj:** Unua premio: € 200; dua premio: € 140; tria premio: € 80; Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) € 140; Infanlibro de la Jaro: € 420.

**Publikigo:** La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj. Laŭ interkonsento kun UEA, jam de multaj jaroj la literatura revuo *Fonto* aperigas la premiitajn beletraĵojn.

**Detala regularo** troviĝas ĉe [www.uea.org](http://www.uea.org), ĉe "Regularo", kaj haveblas kontraŭ unu respondkupono ĉe la CO de UEA (vidu kolofono), ankaŭ retpoŝte (☒ [uea@co.uea.org](mailto:uea@co.uea.org)).

## Malfermitaj pordoj en Roterdamo

Malferma Tago de la Centra Oficejo en Roterdamo fariĝis sukcesa kaj novtipa E-aranĝo, kiu montras sinceran intereson de la membroj pri la vivo de ilia asocio. La lastan, jam la 16-an, vizitis fine de aprilo 62 esperantistoj. La nova ĝenerala direktoro Trevor Steele invitis kiel prelegantojn la direktoron de la Brusela Komunikad-Centro David Ferguson, kiu prelegis pri la centro kaj lingvopolitiko; kaj la direktoron de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno Herbert Mayer, kiu parolis i.a. pri la eldonaĵoj de IEM. Estis montritaj novaj videofilmojn en Esperanto de Roman Dobrzyński kaj okazis vigla butikumado en la libroservo kun donacitaj kafo, teo kaj - speciala rabato!

La 17-a Malferma Tago okazos sabato la 30-an de novembro 2002. Pri interkultura kompreniĝo en praktiko prelegos Elisabeth Schwarzer; pri redaktado de E-revuoj parolos kaj je renkontiĝo kun la legantoj ĝojas - via redaktoro Stano Marček!

UEA pardonpetas pro neĝusta informo en la Jarlibro p. 74: la juĝintoj de la poezia branĉo de la Belartaj Konkursoj de 2002 estis Lidia Ligeza, Katalina Halo kaj Rejna de Jong-Beukers.



## La vojo al perfektigo

**Kiel oni akiras ekkonojn pri la superaj mondoj?** (1914). Rudolf Steiner (1861-1925). El la germana tradukis Willy Nüesch. Berno: La tradukinto, 2001. 157p. 21 cm. € 18,00.

**La edukado de la infano el la vidpunkto de la spiritoscienco** (1907). Rudolf Steiner (1861-1925). El la germana tradukis Willy Nüesch. Berno: La tradukinto, 2000. 40p. 21 cm. € 3,90.

Se vi interesiĝas pri la spirita scienco, en libroj de Rudolf Steiner vi certe tion trovos. Dum kelkaj jaroj mi studas la Kosmologion de Martinus, kaj nun la Providenco sendis al mi du librojn de Rudolf Steiner. Ambaŭ aŭtoroj rakontas pri la spirita aferoj. La vero estas unu, sed ili prezentas ĝin diversmaniere, kaj tio helpas ekkoni principojn de la vivo el diversaj vidpunktoj.

Rudolf Steiner skribis en la libro *Kiel oni akiras ekkonojn pri la superaj mondoj?*, ke en ĉiu homo dormas kapabloj, per kiuj li povas akiri al si ekkonojn pri la superaj mondoj. Temas nur pri tio, kiel procedi por evoluigi en si tiujn kapablojn. Bona helpanto estas la okulta instruado. Laŭ ĝiaj indikoj ĉiu lernanto devas trapasi tri ŝtupojn:

1. La preparado. Ĝi evoluigas la spiritaĵajn sensojn.

2. La iluminado. Ĝi ek-lumigas la spiritan lumon.

3. La inicado. Ĝi inaŭguras la komunikigon kun la superaj estaĵoj de la spirito.

La aŭtoro detale priskribas la procezon de instruado tra ĉiuj tri ŝtupoj, kaj li klarigas, ke la spirita scienco al neniu altrudas la veron, ĝi ne proklamas dogmojn, sed ĝi montras la vojon.

Komprenibile ĉiu mem iam trovos tiun vojon, sed eble nur post multaj reen-karniĝoj. La okulta instruado mallongigas tiun vojon. Sed ankaŭ al tiu, kiu ne volas aŭ ne povas trapasi la okultan instruadon, estas utile ekscii la aranĝon de la vivo en indikita direkto. Vivi laŭ tiuj mondrigardoj signifas labori je sia spirita perfektigo. Sin perfektigi neniel estas egoismo. Ĉar la neperfekta homo estas ankaŭ neperfekta servanto de la homaro kaj la mondo. Ju pli bona oni mem estas, des pli bone oni servas al la mondtuto.

La okult-lernanto ne rajtas senfaze spekti kiel trokreskas la malbono, li devas serĉi en la malbono tiujn flankojn, per kiuj li povas ĝin transformi en bonon. Li pli kaj pli klare vidas, ke la plej ĝusta batalo kontraŭ malbono kaj neperfekto estas kreado de bono kaj perfekte, ke el nenio ne povas esti kreata io, sed ke io neperfekta povas esti transformata al perfekta. Li devas subpremi sian superfluan kritikon kontraŭ la neperfekta, malbona aŭ fia, kontraŭe li devas provi kompreni ĉion renkontitan. Kiel la suno sendas siajn lumon kaj varmon

same al malbonuloj kaj bonuloj, tiel ankaŭ lernanto pri okultajoj devas kompreni kaj ami ĉiujn. Post inicado li ne rajtas vivi sola en la beato, li devas helpi al ĉiuj aliaj teraj estuloj evolui kaj liberiĝi de la malbono.

La vojo al perfektigo estas ege malfacila, oni devas atingi regadon super tri animfortoj: volado, sentado kaj pensado. Tiuj tri fortoj devas evolui inter si harmonie.

En la libreto *La edukado de la infano el la vidpunkto de la spiritoscienco* R. Steiner rakontas kiamaniere eblas eduki infanojn helpe de la spiritoscienco. Unue oni devas koni la naturon de infanoj. Ĉiu homo havas ne nur fizikan korpon, li havas ankaŭ la eteran aŭ vivokorpon, la astralan aŭ sencokorpon, kaj la miokorpon. La spiritoscienco prezentas tri naskiĝojn: kiam bebo forlasas la patrinan uteron estas

fizika naskiĝo; dum dentoŝanĝiĝo (ĉ. la 7-a jaro) la etera kovrilo ellasas la eteran korpon; en komenco de seksmaturiĝo la astrala korpo liberiĝas de la astrala kovrilo. Kiel antaŭ la naskiĝo la naturo pretigas la gustan ĉirkaŭaĵon por la fizika homa korpo, tiel post la naskiĝo la edukisto devas zorgi pri la ĝusta fizika ĉirkaŭaĵo.

Ĝis la dentoŝanĝiĝo la infano imitas tion, kio okazas en la fizika ĉirkaŭaĵo, kaj dum la imitado liaj fizikaj organoj muldiĝas en formojn, kiuj poste restas al li. Se la infano en sia

ĉirkaŭaĵo vidas moralajojn, en ĝia cerbo kaj sangocirkulado formiĝas dispozicioj por la sana morala sento. Kiel ĝis la sepa jaro oni devas prezenti la fizikan modelon, kiun la infano povas imiti, tiel inter dentoŝanĝiĝo kaj seksmaturiĝo en la ĉirkaŭaĵon de la estiĝanta homo devas esti portata ĉio tio, laŭ kies interna senco kaj valoro li povas sin direkti. Tial antaŭ ĉio gravas, ke en tiuj jaroj la juna homo inter siaj edukantoj havu personojn, kies konduto povas vekti en li la dezirindajn intelektajn kaj moralajn fortojn.

En tiu ĉi libreto estas elvolvataj nur kelkaj vidpunktoj por la edukado en spiritoscienca senco. Sed tio celas doni nur atentigon pri tio, kian kulturtaskon ĉi-riilate devas plenumi tiu spiritoscienco.

Se vi deziras iĝi pli kaj pli perfekta, legu librojn de Rudolf Steiner, ili certe helpas al vi...

Rita Valiūkaitė, Litovio


## Planlingvoj: ekde projekto ĝis realaĵo

Planned Languages: From Concept to Reality. Red. Klaus Schubert. Bruselo: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst (VLEKHO) / Interface. Journal of Applied Linguistics 15.1 (2000), 3-4. 257p. ISBN 806813-1-824cm. € 24,00

La interlingvistiko estas branĉo de la lingvistiko, kies valoro kaj praktika aplikado estas apenaŭ rekonata, ekster relative malgranda rondo de specialistoj. Sendube, ĉi tiu volumo estos ne nur interesa aldonajo al la literaturo pri interlingvistiko, sed demonstras kiel la rezultoj de interlingvistika studado kaj esplorado povas kontribui al la solvoj de diversaj problemoj en la kampo de la aplikata lingvistiko.

La verko konsistas el 8 referaĵoj en lingvoj germana, angla, franca kaj Esperanto, kontribuitaj de fakuloj bone konataj en la lingvistika kaj esperantologia medioj (Schubert, Tonkin, Blanke, Duc Goninaz, Koutny, Liu Haitao, Corsetti, La Torre kaj Van Oostendorp). Krome, W. M. A. De Smet kontribuas mallongan omaĝon al Edward Symoens en la nederlanda.

Tonkin montras kiel Zamenhof uzis la literaturon por krei vivantan komunumon, kaj por provizi sian lingvon ne nur



per estonteco, sed ankaŭ per pasinteco.

Blanke skizas 28 etapojn tra kiuj planlingvo pasas por atingi la statuson de vivanta disvastigita idiomo. Duc Goninaz alfrontas la problemojn de la Esperanta leksikografio. Koutny raportas pri la utilo de Esperanto en parol-prilaborado kaj artifika parolsintezo.

Lingva evoluo, ilustrita per la historio de piĝinaj kaj kreolaj lingvoj, kaj komparo kun planlingvoj estas la temo de Liu Haitao, dum Corsetti kaj Torre diskutas la gravecon de klara strukturo ĉe lingva lernado. Van Oostendorp okupas sin per la komuna distingo inter konstruitaj kaj "naturnaj" lingvoj, kaj anstataŭigas tiujn terminojn per la plej signifaj kategorioj, eblaj, neeblaj kaj efektivaj lingvoj.

Fine, Schubert traktas pri la apliko de planlingvoj al la kreado de reuzitaj lingvoj por industria uzado, al la maŝina tradukado, kaj al la faka komunikado.


Garbh MacAoidh

## Kontribuajoj al internacia simpozio

Lingva Planado kaj Leksikologio. Language Planning and Lexicology. Proceedings of an International Symposium, Zagreb 2001 07 28-30. Red. Christer Kiselman kaj Geraldo Mattos, Chapecó / Brasilia: Fonto, 2001. € 15,90

Nome de la Akademio de Esperanto, Christer Kiselman kaj Geraldo Mattos kolektis lastjarajn kontribuojn al la simpozio, kiun ekde Prago 1996 (ne 1994, kiel eraras la enkonduko) oni foje organizas kadre de la Universala Kongreso. Dek du el la ricevitaj artikoloj estas en Esperanto, nur kvin en la angla (parte ili tre mallongas). Ekzemple unu serio okupiĝas pri planlingvoj kaj ilia leksikono, nome la kontribuoj de Julius Balbin (*Language Planning and Planned International Languages*), Vilmos Benczik (*Komunikteoriaj konsideroj pri Esperanto kaj ĝia leksiko*), Detlev Blanke (*Pri la leksikografio de kelkaj planlingvoj. Tipologia kaj bibliografia skizo*), kaj Walter Zelazny (*La lingvoplanado favore al la internacia Lingvo bezonas novan leksikon de la sociaj kaj politikaj sciencoj*).

Kelkaj kontribuoj rilatas al terminologiaj demandoj kaj fakterminoj: Heinz Hoffmann (*Komenco de nocisistemigo ĉe fervojo*), Christer Kiselman (*Kreado de matematikaj terminoj*), Ilona Koutny (*De nociklasifiko ĝis temvortaroj. Esperanta*



vortprovizo en temgrupoj). Pliaj esperantaĵoj foje nur malfacile estas ligeblaj al la temo de la simpozio, ekz. la ideoj de Ottó Haszpra pri *Kritika trarigardo de la provoj modernigi la Fundamentan alfabeton de la komencoj ĝis 2001*.

Inter la esperantaĵoj la (nur anglalingvaj) kontribuoj pri nacilingvaj fenomenoj aspektas sufiĉe apartaj, ekz. de Petek Kurtböke (*Schizoglossia, Turkish Language Reform and Dictionaries*) kaj de Fin Ku-hung (*Lexical differences in Chinese across the Taiwan Strait*).

Se simpozio estas origine la kuntrinkado de viroj en Grekio, tiam la zagrebaj gustumantoj havis brandon, el bonaj kaj foje ne tiom bonaj vinoj.

Rekomendinda aĉetaĵo la brando estas maksimume por legataro kun tre larĝ-gama lingvistika interesiĝo. Bedaŭrinde mankas resumoj de la artikoloj en la alia lingvo, kvankam oni povus atendi tion je eldonajo kun dulingva titolo.

Ziko Marcus Sikosek

## Baldaŭ 75 000 e-libroj

Preskaŭ 250 titoloj de elektronikaj libroj kaj 75 000 "aĉetoj" (senpagaj elŝutoj), tia estas la bilanco de eLibrejo [www.esperanto.nu/eLibrejo](http://www.esperanto.nu/eLibrejo).

Unu el ĝiaj plej ambiciaj projektoj estas publikigo de la unua originala romano en Esperanto *Kastelo de Prelongo* de Henri Vallienne el 1907. La 700-paĝa eLibron realigis Miroslav Malovec el Brno, Ĉeĥio, kaj Franko Luin el Tyresö, Svedio. Preparata estas ankaŭ la dua, pli ol 500-paĝa romano de d-ro Vallienne, *Ĉu li?* el 1908. Novaĵo estas elektronika libro-revuo *Uzino*, kun literaturaj eroj tro mallongaj por aperi en propra libro: rakontoj, noveloj kaj unuopaj ĉapitroj el libroj. Franko Luin





## Freŝa vento el Sudameriko

**La Porkoj: Ŝako. Kompakta disko, 9 titoloj, 25 minutoj. Vinilkosmo, 1999, Donneville, Francio. € 15,00**

pruvas *La Porkoj* per sia unua albumo kiu aperis kadre de la "Kolekto 2000". Aparte de pluraj verkoj en la ĵus menciita stilo, Alejandro Cossavella kaj liaj kunbandanoj prezentas unu baladon kaj unu bluson. La rokaj partoj tamen restas pli fortaj kaj determinas la vigran, vivoplenan, ĝojan kaj ĝuan karakteron de la KD. La instrumentoj estas tipe rokaj, nome drumo, basgitaro kaj – kiel ĉiam en bona rokmuziko – elstara elektra gitaro; en la malrapidaj pecoj eksonas akustika gitaro. Plie plačas la klara, ofte alta kaj bone

komprenebla kantado. En la maldecetaj tekstoj, ilustritaj cetere per kongruaj desegnaĵoj, la atenta aŭskultanto trovos foje ankaŭ aludon pri la Esperanto-movado mem. Tamen eĉ pli interesas la alparolo de "pacaj batalantoj" en la kontraŭmilita kanto. Kiel kritikpunktoj notindas ke la rokaj pecoj iom similas unu al la alia kaj ke la albumo mem tro mallongas. Sed entute temas pri konvinka KD kies rapidaj partoj jam plurfoje montris sian taŭgecon por dancado en etosplenaj Esperanto-diskotekoj. **DĴ Kunar**

**K**e bona Esperanto-muziko ne nepre devas veni el Eŭropo, tio ne estas novaĵo. Sed ke ekzistas bonega rokmuziko el Argentino, tion nun

## Laste aperis

**LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insiĝoj k.s. 19% pro la aldona valoro imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogol/>.**

**Aŭtoportreto kun virino, La.** Pola Biblioteko, volumo 176. Andrzej Szczępiński. El la pola trad. Tomasz Chmielik. Svidniko: La tradukinto, 1994. 145p. 28cm. € 16,50

**Aviada terminaro.** Aeronautika vortaro angla-Esperanta. Gilbert R. Ledon. Chapeco: Ponto, 2002. 286p. 21cm. Ilus. 1000 terminoj, 4000 esprimoj en 13 laŭtemaj ĉapitroj; baza aviada frazeologio. € 15,00

**Baptofilino, La.** Jon Mirande. El la eŭska Joxemari Sarasua. Chapeco: Ponto, 2002. 94p. 21cm. Amromaneto pri 30-jara viro kaj 11-jarulinio, kies apero eblis nur dekon da jaroj post la finverko. € 9,90

**Curso básico de esperanto: Aŭdu kaj lernu.** Sylla Chaves. São Paulo: Associação Paulista de Esperanto, 1999 (4-a eld.). 109p. 21cm. Ilus. Baza kurso en 20 lecionoj; haveblas akompanaj kasedoj. € 6,90

**Desafio das línguas, O. Da má gestão ao bom senso.** Claude

Piron. En la portugalan trad. Ismael Mattos Andrade Ávila. Campinas/Brasília: Pontes/BEL, 2002. 287p. ISBN 85 7113 160 0. 21cm. Portugallingva eldono de la verko unue aperinta en la franca. € 15,00

**Dharmopado.** El la palia trad. Gunnar Gällmo. Stockholm: ESE, 2002. 110p. ISBN 91 85288 25 X. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro. 36. La plej tradukita parto de la Tripitako en nova Esperanta versio. € 18,00

**Dicionário do principiante esperanto-português.** Sylla Chaves. São Paulo: Associação Paulista de Esperanto, 1999. 80p. 21cm. Baza vortaro por komencantoj kun 1300 radikoj kaj ĉ. 4500 derivitaj vortoj. € 4,80

**Edmond Privat. La Epoko:**

**kaj.5.** C. kaj A. Gacond, T. Chmielik. Svidniko: Libro-Mondo, 2002. 83p. 28cm. Biografij skizoj pri Edmond kaj Yvonne Privat; longa intervjuo kun Gacond; fragmentoj el *Interpopola konduto*; eldonplano de *Iam kompletigota verkaro de E. Privat*. € 6,90

**Ekzercu vin en bazaj vortoj!** Tani Hiroyuki. Toyonaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 2002. 247p. ISBN 4 88887 020 9. 21cm. Lernohelpilo por japanlingvanoj kun abunda vortlisto. € 12,00

**En la kongreso kaj aliaj legaĵoj.** Facila legaĵo 5. Sylla Chaves. Rio-de-Janeiro: Asocio Esperantista de Rio de Janeiro, 1999. 32p. 15cm. € 2,70

**Enprizonigo: krepusko de erao.** César Barros Leal. El la



portulaga trad. James Rezende Piton. Fortaleza: Edições Demócrito Rocha, 2002. 151p. ISBN 85 7529 084 3. 20cm. Pri enprizonigo kaj alternativaj punoj kiel solvo de kontraŭleĝaj agoj. Komparo inter la brazila kaj alilandaj sistemoj. € 6,90

**Esperanto – ein Ausweg aus Babylon? 95 Jahre Esperanto in Düsseldorf.** Edeltraud und Max Hans-Jürgen Mattusch. Düsseldorf: Verlag videel OHG, 2002. 205p. ISBN 3 89906 339 2. 20cm. Kun fotoj. € 9,90

**Esperanto num relance, O. Notas gramaticais.** Sylla Chaves. Rio-de-Janeiro: Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro, 1998. 80p. 15cm. Baza enkonduko en Esperanton por portugallingvanoj. € 3,60

**Esperanto-bulgara poŝvortaro.** Petar Todorov, Georgi Mihalkov. Sofio: Bulgara Esperanto-Asocio, 2002. 191p. 12cm. € 3,60

**Esperanto: The New Latin for the Church and for Ecumenism.** Ulrich Matthis. El E-o en la anglan trad. M. Leon and M. Mullarney. Antwerp: FEL, 2002.

144p. ISBN 90 77066 04 7. 21cm. Ilus. € 7,50

**Inglese distruggerà le nostre lingue, L'? Ed è possibile porvi rimedio?** Andrea Chiti Batelli. 2002. 20p. 24cm. Itallingva. Ĉu eblas rimedo kontraŭ la lingvovora angla? € 2,40

**Janusz Korczak fare kaj verke.** Komp. Tomasz Chmielik. Svidniko: La kompilinto, 1993. 34p. 28cm. € 4,20

**Juna verkisto, La.** Facila legaĵo 2. Sylla Chaves. Rio-de-Janeiro: Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro, 1999. 32p. 15cm. € 2,70

**Kandeloj en vento.** Grigorij Kanovič. El la rusa trad. Tomasz Chmielik. Svidniko: La tradukinto, 2001. 358p. 28cm. Romano pri juda knabo, kiu spertas unue sovetan, poste nazian invadon de Litovio. Bele, poeziece verkita. € 33,00

**Kelkaj faktoj pri budhismo.** Gunnar Gällmo. Stockholm: ESE, 2002. 77p. ISBN 91 85288 27 6. 21cm. Pritrakto de la budhisma instruo laŭ ties plej malnovaj ankoraŭ ekzistantaj tekstoj, dividita en tri ĉapitrojn: La instruanto, La instruo, La instruato. € 9,90

**Kongresa kajero.** 9-a togolanda Esperanto-kongreso. Div. Fondajo Afriko, 2002. 62p. 21cm. Raportoj de la 9-a Togolanda Esperanto-kongreso (26-31 dec. 2001). € 3,00

**Kongresa libro de Universala Kongreso.** Rotterdam: UEA, eldonata ĉiujare. 112p. 21cm. Manlibro kun detala programo pri UK kaj adresaro de partoprenantoj. € 6,00

**Konversacia klubo, La.** Perfekta kurso de Esperanto. J. Salles. Rio-de-Janeiro: AERJ, 2002. 112p. 23cm. Portugallingva kurso por progresintoj, por kursa aŭ aŭtodidakta studo. € 10,80

**Munjo.** Trixini. Desegnaĵoj de Ralf Fieseler. Kaufbeuren: La aŭtoro, 2001 (2a eld.). 33p. 21cm. Munjo estas kvinjara knabino, kiu

scias pli multe ol ĝiaj samaĝuloj. Eĉ tro multe. € 3,90

**Nova amiko inter ni.** Facila legaĵo 6. Sylla Chaves. Rio-de-Janeiro: Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro, 1999. 40p. 15cm. € 2,70

**Nova aŭroro.** Abel Glaser. Spiritita aŭtoro Cairbar Schutel. El la portugala trad. Osvaldo Pires de Holanda. Matão: O Clarim, 2002. 165p. ISBN 85 7357 059 8. 21cm.

**Rapida vojo al legado kaj kanto en Esperanto.** Facila legaĵo 1. Sylla Chaves. Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro, 1999. 32p. 15cm. € 2,70

**Sanktigita vivo.** Ellen G. White. El la germana trad. Walter Haberl. Łgdziny: Sano, 2000. 92p. 20cm. € 3,60

**Sep leteroj.** Facila legaĵo 4. Sylla Chaves. Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro, 1999. 40p. 15cm. € 2,70

**Varia bukedo.** Facila legaĵo 3. Sylla Chaves: Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro, 1999. 32p. 15cm. € 2,70

## KASEDOJ, KOMPAKTDISKOJ, VIDBENDOJ

**Baza kurso de Esperanto: Aŭdu kaj lernu.** Sylla Chaves. Rio-de-Janeiro: Associação Esperantista de Rio-de-Janeiro. Kasedo kun akompana teksto-kajero. 20-leciana kurso por radio. € 6,90

**Elektitaj kantoj. Pri paco, amo kaj naturo.** Sylla Chaves. Kantas J. de Castro, F. Fenati, A. Ymakayan k.a. Rio-de-Janeiro: Lar Fabiano de Cristo, 2001. 54 min. Prezo: kompaktdisko € 9,60; kasedo: € 7,50



**José Esperante.** 28 min. Kun akompana broŝuro. 9 originalaj kantoj, kelkaj engaĝitaj, kelkaj nostalgiaj, sed ĉiuj agrablaj. Kompaktdisko. € 7,80

**Korvo, La.** E. A. Poe, G. Junqueiro, C. Neto, O. Wilde. Deklamas L. kaj I. Knoedt. En Esperantanto trad. L. Knoedt. Brasília: BEL, 2002. 54 min. Deklamado de famaj beletraj verkoj kun muzika akompano. Kompaktdisko. € 12,60

**Plurspecaj eroj por artaj vesperoj.** Sylla Chaves. Rio-de-Janeiro: Lar Fabiano de Cristo. 57 min. Havebla en PAL kaj NTSC-sistemo. Kolekto de Esperantaj

kantoj kaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj, aranĝitaj en 7 cikloj. Subtitolita en Esperanto. € 13,50

**Rapida vojo al legado kaj kanto en Esperanto.** Sylla Chaves. Rio-de-Janeiro: Lar Fabiano de Cristo, 2001. 58 min. Enkonduko en Esperanton per mallongaj kantoj, dialogoj, poemoj. Parto de la tekstoj sur akompana 12-paĝa broŝuro. Prezo: kompaktdisko € 9,60; kasedo € 6,90



Ilus. Prezento de la spiritisma societo "Fratino Scheilla" kaj de la hejmo-lernejo "Cairbar Schutel" en la spirita urbo "Nova Aŭroro". € 6,60

**Opinion occidentale et la cause de l'indépendance de la Pologne pendant la Première Guerre mondiale, L'. L'activité d'Edmond Privat.** Wiesław Śladkowski. Red. T. Chmielik. Svidniko: La redaktinto, 2000. 39p. 28cm. Franclingva. € 4,80

**Slango kaj ĵargono en Esperanto.** Wouter F. Pilger. Debrecen: HEA, 2002 (2-a eld.). 64p. ISBN 963 03 6618 5. 12cm. Kun hungarlingva aldono de T. Papp. € 5,40

**Unu tago en la vivo de Teodoro kaj aliaj legaĵoj.** Facila legaĵo 7. Sylla Chaves. Rio-de-Janeiro: Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro, 1999. 32p. 15cm. € 2,70



## Loke

\* **KINSHASA:** okaze de la 115-a datreveno de Esperanto estis organizita en Kinshasa, Demokratia Respubliko Kongo, Kultura Tago pri Esperanto. Okazis ekspozicio kaj prelegoj pri la temo *La loko de Esperanto kaj ĝia rolo en la tutmondiĝo*. La prelego de Bagalama Ka Yange, prezidanto de KER/NRO (Neregistara Organizaĵo Kongolanda Esperantista Rondo) kaj Ĝenerala Sekretario ĉe la Ministerio pri Informado en Dem. Resp. Kongo, estis pri *La graveco de la Komunikado pere de Esperanto*. La dua preleganto Emile Malanda parolis pri *Esperanto en tutmondisma skalo*. La Kultura Tago okazis kongrue kun la malfermotago de la 87-a UK en Fortalezo. Estis invitita la Ambasadoro de la Japana Konsulejo, venis la Vic-prezidanto de DKEA, prezidantoj de diversaj NRO-j, ĵurnalistoj, studentoj. (Emile Malanda).

\* **RIJEKA:** La multkultura kroata havenurbo Rijeka gastigis de la 31-a de majo ĝis la 1-a de junio la 5-an Kongreson de Kroataj Esperantistoj, kun du paralelaj aranĝoj: 14-a Alp-Adria Konferenco kaj Mezeŭropa Konsultiĝo. Al la aranĝoj venis 170 partoprenantoj el naŭ landoj. Siajn bondezirojn sendis al la aranĝoj Prezidento de Kroatio Stjepan Mešić, la aŭspicianto de la 86-a UK en Zagreb. La prezidantoj kaj sekretarioj de Landaj asocioj de Mezeŭropo diskutis pri siaj labor-

programoj por 2002 kaj 2003 kaj informiĝis pri la kroata projekto *Mezeŭropo estas mia hejmo*, kiu celas inviti gimnazianojn al Kroatio por kompari lernolibrojn pri literaturo, historio kaj geografio.

\* **VERMLANDO:** Interesa seminario de la Sveda E-Instituto okazis en la konata E-Kursejo en Vermlando, dum la lasta septembra semajnfino. Prelegis Atilio Orellana Rojas kaj Ralf Frohlich. Atilio parolis pri la agado Indiĝenaj Dialogoj kaj pri la kulturo de la Inkaa Imperio.

## Fake

\* **RELIGIO:** ekzistas faka ret-listo por esperantistoj, kiuj interesiĝas pri religiaj aŭ parencaj temoj: <per-esperanto-religio@yahooogroups.com>. Oni aliĝas per la kutima senteksta mesaĝo al <per-esperanto-religio-subscribe@yahooogroups.com>.

\* **HISTORIO:** Fondiĝis Yahoo-retgrupo pri la historio de Esperanto: lingvo, movado, biografioj. La fondinto Ziko M. Sikosek esperas ke la listo fariĝos forumo por prezenti eltrovaĵojn kaj popularigi nian historion. Por aliĝi bv. simple sendi blankan mesaĝon al:

Ralf pri Informado pri Esperanto analizita laŭ profesiaj varbmetodoj kaj pri aktualaj projektoj de la E-movadoj en interreto. Partoprenis 46 samideanoj, inter ili 8 kursantoj de la lasta kurso de Karlskoga Popolaltlernejo.

\* **HUKUSIMA:** De la 4-a ĝis la 6-a de oktobro 2002 okazis en la japana urbo Hukusima (Fukuŝima) la 89-a Japana Esperanto-Kongreso kun la ĉeftemo *Floru Kulturo Porpaca*. Aliĝis 424, sed venis 248 kongresanoj. Krome 112 civitanoj vizitis publikan prelegon de HEMMI Yō. Okazis busa ekskurso, prelegoj, fakkunsidoj kaj kunsido dediĉita al organizado de la baldaŭa 100-jara jubileo de organizita E-movado en Japanio kun la propono inviti UK-on en 2007 al la banloko Lizaka.

ehist-subscribe@yahooogroups.com

\* **SCIENCOJ:** en Nederlando aperis la venontjara versio de la ĉiujara sciencetema ŝirfolia kalendario, kun po 1 demando/tezo kaj dorsflanka klarigo por ĉiu tago de la jaro. La kalendario por 2003 enhavas Esperanto-teman semajnon de la 15-a ĝis la 22-a de decembro! La kalendario estas populara jarfina donaco kaj estas vaste vendata tutlande. La sep demandojn kaj akompanajn klarigojn pri la Esperanto-semajno redaktis Wim Jansen.

\* **KULTURO:** En Ukrainio estis registrita *Societo por subteno kaj defendo de ukraina kulturo "Espero"*. Kunlabore kun la Kulturministerio, Fonduso Kulturo kaj aliaj organizaĵoj ĝi planas atentigi potenculojn pri la danĝera situacio rilate al la ukraina kulturo kaj lingvo, kaj helpe de ebloj, kiujn donas uzo de Esperanto promocii ukrainan kulturon eksterlanden. Kunlaboremuloj kontakti la prezidanton: Mikaelo Lineckij, UEA-Delegito por Kijivo (Ukrainio).

\* **MANKOLISTOJ:** Retpaĝo pri titoloj de mankantaj titoloj de Esperanto-bibliotekoj troviĝas ĉe: <http://www.xs4all.be/~rotsaert/bib/>.

\* **SAT:** La broŝuro *Kio estas SAT?*, verkita de Henri Masson, ekzistas nun ankaŭ en interreta versio ĉe <<http://users.skynet.be/Esperanto/Kio-estas-SAT.html>>, dank' al iniciato de Jakvo Schramm. Rimarkojn pri ev. tajperaroj adresu al [jakvo@pagadoro.skynet.be](mailto:jakvo@pagadoro.skynet.be), pri la enhavo al [Henri\\_Masson@esperohm.club-internet.fr](mailto:Henri_Masson@esperohm.club-internet.fr).



## ĈIUMONATA SOCI-KULTURA REVUO

KUN LITERATURA SUPLEMENTO JARFINE

TRA ESPERANTUJO: Faktoj, problemoj, komentarioj  
CIVILIZO: Kia estis, estas kaj estos la mondo?  
ESPERANTO: lingvo, komunumo, literaturo  
Novelaj kaj poemoj, originalaj kaj tradukitaj  
Ĉiujara proklamo de la Esperantisto de la Jaro

Abonebla kontraŭ 25 eŭroj ĉe UEA  
kaj landaj perantoj. Provezkemplero ĉe  
RU-236039 Kaliningrad, p.k.1248, Ruslando

\* **LIBROFOIRO:** Dum la granda librofoiro en Gotenburgo, Svedio (19-22 sep), en la sama ejo kie okazos la venontjara UK, partoprenis Eldona Societo Esperanto. Estis venditaj kelkaj libroj, prezentitaj Esperanto kaj nia movado, disdonitaj multaj ekzempleroj de *Esperanto en interreto*. Multaj junuloj montris seriozan intereson.

\* **EXPLORER:** Israela rusdevena novulo Alexey Kletsel (studanta E-on en rusia reta E-kurso) kunlaboris pri interfaci de senpaga aldonajo al Esplorilo (Explorer)

kaj sukcesis konvinki la prizorgantojn, ke ankaŭ Esperanto estu aldonita. La programeto estas tute senpaga. Ĝi similas al programeto Google-bar – do, helpas pri serĉado, kontrolado de viaj POP3-poŝtkestoj, blokas elsaltantaj fenestrojn, kontrolas domajn nomojn, k.t.p. Elŭti la programeton eblas ĉe: [www.pbar.net](http://www.pbar.net) (download).

\* **FOTOKONKURSO:** La redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al la 5-a Internacia Fotokonkurso. La fotojn (min. formato 10x15 cm, koloraj aŭ nigre-blankaj) sendu ĝis la 15-a de decembro 2002, kun pseŭdonima subskribo (kaj koverto kun kaŝita nomo) al: Halina Gorecka, ab. ja. 1248, RU-236039 Kaliningrad, Ruslando.

## Oficiala informilo



### NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Ĉilio: José Antonio Vergara Olavarría. Koreio: Ma Young-tae.

### SOCIETO ZAMENHOF 2002

Nederlando: M.van Bentum-v.d.Broek.

### DONACOJ 2002 (EUR)

ĝis la 30a de septembro

Asocia Kapitalo: Nederlando: Heredaĵo N.L.P. Slösser 4537,80. Sumo ĉi-jara: 4537,80.

Afrika Kapitalo: Anonime 7000,00. Belgio: La Verda Stelo 185,00. Brazilo: Anonime 106,75. Japanio: Y. Mine 50,00. Nederlando: L. Hordijk 100,00; W.A. Massar-van Diepen 2000,00; Usono: W. Harmon 100,00. Sumo ĉi-jara: 9757,75.

Fondaĵo Afriko: Kanado: U.P. Ronald 25,00. Japanio: Y. Mine 50,00. Nederlando: G.A.M. van Bergeijk 30,00; Fam. ten Hagen 100,00; F.J. Pieteron-Kruger 45,00. Sumo ĉi-jara: 1217,17.

Fondaĵo Ameriko: Brazilo: Anonime 1522,89. Sumo ĉi-jara: 3907,46.

Fondaĵo Azio: Japanio: K.Kai 17,06; I. Katou 17,06; T. Rin 17,06; K. Tutiya 17,06; Esp.Ligo de Sikoku 17,05. Sumo ĉi-jara: 2969,21.

Balkana Komisiono: Italio: R. Corsetti 50,00. Sumo ĉi-jara: 50,00.

Fondaĵo Canuto: Nederlando: F.J. Pieteron-Kruger 45,00; A.P.G. Ploeg 10,00. Sumo ĉi-jara: 1511,20.

Junulara Fondaĵo: Francio: F. Bartsch 50,00. Germanio: B. Maul-Propadovic (PS) 5,00; S. Sassenberg (PS) 5,00; D. Wibrow (PS) 20,00; K. Winterhoff (PS) 10,00. Nederlando: G.A.M. v. Bergeijk 30,00.

Norvegio: J. Aldstedt (PS) 5,00. Sumo ĉi-jara: 301,50.

Lingvo de Paco: Nederlando: R. Moerbeek 100,00. Sumo ĉi-jara: 5819,97.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Nederlando: A.P.G. Ploeg 10,00. Pollando: K. Babiartz 20,00. Sumo ĉi-jara: 821,93.

Volontula Fondaĵo: Nederlando: F.J. Pieteron-Kruger 45,00; A.P.G. Ploeg 10,00. Sumo ĉi-jara: 174,70.

Konto Eŭropo: Nederlando: G.A.M. van Bergeijk 30,00. Sumo ĉi-jara: 30,00.

Ĝenerala Kaso: Usono: T. Martin 9,85; J. Tilman Williams 78,86. Sumo ĉi-jara: 1499,46.

**Al ĉiuj tre koran dankon! UEA**



## Persone

\* **ZVARA:** La Urba Registaro de Poprad en Slovakio, aprobis dum sia kunsido la 26-an de septembro 2002, ke la parko en la centro de la urbo Poprad portos la nomon "Parko de Milan Zvara". La mondkonata esperantisto Milan Zvara forpasis la 30-an de januaro 2002. Li estis Prezidanto de Slovaka Esperanto-Federacio kaj Estrano de Monda Turismo.

\* **JANSEN:** En Nederlando aperis nova nederlandlingva libro de Wim Jansen kun la provoka anglalingva titolo *Relax!*, kun esoj kaj rakontoj pri lingvoproblemoj. La aŭtoro en ĝi

prilumas la eblecojn de Esperanto kiel helpilingvo por Eŭropa Unio. La libro estas havebla en ĉiuj nederlandaj librovendejoj (ISBN 90-204-2055-0).

\* **FIGHIERA:** La Asocio de Profesiaj Kongres-Organizistoj (AIMP) asignis la prestiĝan premion *Marco Ferronato 2002* al G. C. Fighiera pro lia kontribuo al la evoluado de la prikongresaj scienco kaj teknikoj. Fighiera, iama Konstanta Kongresa Sekretario de UEA, aperigis ses librojn kaj 15 monografiojn – en la itala, franca kaj Esperanto – pri la kongresaj merkato, produkto, manaĝerado kaj organizado.

### FERIU EN SARDINIO!

Eblas mendi du belajn apartamentojn en la vilaĝo de Orosei, kiu situas en la orienta flanko de Sardinio. Plej proksima flughaveno estas Olbia. Estas multaj belaj plaĝoj kun varma blua maro en la regiono. Por atingi la plej proksiman eblas marŝi ĉirkaŭ 20 minutojn. Unu apartamento kun du litĉambroj, salono, kuirejo, banĉambro por 15 tagoj/14 noktoj kostas 620 eŭrojn. Apartamento kun unu litĉambro, salono (kie oni povas ankaŭ dormi), kuirejo, banĉambro, por 15 tagoj/14 noktoj kostas 415 eŭrojn. Donna Marialuisa Satta, Via La Marmora 27, Orosei, 08028 (NU), Sardegna, Italia, tel. 0039-0784-98767.

\* **Korespondi deziras 19-jara fraŭlino,** interesiĝanta pri biciklado, vojaĝado, geografio kaj muziko (gitaro): Irmina Szustak, Targowa 39 m 73, PL-03-728, Pollando, rete: [ikudlata@poczta.onet.pl](mailto:ikudlata@poczta.onet.pl)

## Anoncetoj

1 vorto = 1 internacia rpk (€0,75). Ni ne respondas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton. Pri korespondpetoj zorgas ankaŭ *Koresponda Sero Mondskala, B.P.6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio, www.multimania.com/kosomo.*



**Internacia Esperanto-Muzeo** en Vieno havas novan retroŝtan adreson: *plansprachen@onb.ac.at*, kiu atingas ĉiujn tri personojn tie laborantajn. Por viziti la hejmaĝon kaj la retkatalogon uzu: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>. (En Jarlibro 2002 sub "Bibliotekoj" estas malnovaj, ne plu funkciaj retadresoj). Hejmaĝo kun la elektronika katalogo TROVANTO: <http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>.



Venu Via Regno

Ni proponas senpagan BIBLIAN STUDKURSON

Se markas al vi Biblio, ni senpage provizos Biblion.

Via Forto estas Jamilo por miaj preĝoj Kaj Jamo por mia roĝo. Psalmo 119:105

INTERNACIA BIBLIO-MISIO 50 WISAGE ROAD, LICHFIELD WS13 6SW Anglio.



## Ekologie kaj folklore en Rigo

La temo de la 12-a Internacia Esperanto-Kongreso estis *Ekologio kaj folkloro*. Ĝi okazis en la latva ĉefurbo de la 1-a ĝis la 7-a de julio 2002.

Partoprenis 200 ŝatantoj de folkloro kaj ekologio el 10 landoj: Hispanio, Italio, Belgio, Svislando, Danlando, Norvegio, Germanio, Pollando, Latvio, Ruslando.

Oni havis la eblon konatiĝi kun la latvia naturo, viziti naciajn parkojn, volontullabori (konstrui labirinton por meditado), ĉeesti koncertojn (kaj mem

Sur la foto: Acero Espero, plantita la 7-an de julio en Rigo, en la parko Grizinkalns.

koncerti por publiko en pluraj urboj), en kiuj prezentiĝis kelkaj polaj kaj latviaj ensembloj.

Dum la kongreso okazis prelegoj kaj ekspozicioj pri ekologiaj temoj kiel *Ekoturismo en Latvio*, *Homa sano*, *Sanigaj produktoj*, oni vizitis firmaon, kiu produktas polimerajn pavimŝtonojn el duafoje refabrikataj polimeroj, estis plantita acero Espero kaj vizitita folkloro festo.

Mara Timermane

## Inaŭguro de la nova brita sidejo

La 17-an de septembro 2002, antaŭ 100 homoj, Renato Corsetti solene inaŭguris novan etapon en la historio de la brita movado. La sidejo troviĝas ĉe Wedgwood Memorial College en Barlastono, Stoke-on-Trent, kie dum multaj jaroj okazas la Somera Lernejo. Ĝi konsistas el oficejo, biblioteko Butler kaj 3 dormĉambroj: Boulton, Auld kaj Barks.

Antaŭ tri jaroj la Esperanto-Asocio de Britio forlasis sian londonan sidejon kaj uzis portempajn oficejojn ĝis la fino de komplika kontrakta intertraktado kaj la starigo de la barlastona sidejo, kie okazis la renovigado kaj pligrandigado de la antaŭa kaleŝejo. Apud la sidejo nun troviĝas Esperanto-ĝardeno, kiu estas unika en Britio.

D-ro Corsetti substrekis la gravecon de la brita movado, kiu faras unikan kontribuon al la antaŭenigo de Esperanto pro sia situo en la kerno de la anglalingva mondo.

La alveninta pola ambasadoro deklaris: *Mi estas ĉi tie pro la genio kaj vizio de Ludoviko Zamenhof.*

Edmund Grimley-Evans, la prezidanto de la Esperanto-Asocio de Britio, lerte resumis la historion de la Asocio kaj deklaris, ke la nuna strategio estas la relanĉo de Esperanto en Britio.



Maldekstre Renato Corsetti kun Vivien O'Dunne, la administranto, apud la Esperanto-Domo, la nova brita sidejo por Esperanto-Asocio de Britio, dum la oficiala inaŭguro. Dekstre: la nova brita sidejo de Esperanto-Asocio de Britio ĉe Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, Anglujo. fotoj: Chris Rushton

La urbestro de Stoke-on-Trent, Ellis Bevan, bonhumore kaj digne tranĉis la rubandon por ke oni eniru por rigardi la sidejon. Li uzis Esperanton por la klimakso de sia parolado.

Oni ankoraŭ analizas la reason de la amaskomunikilaro; sed la konkludo



jam estas pozitiva pro artikoloj en lokaj kaj regionaj ĵurnaloj, radiaj intervjuoj kaj triminuta programero dum la novajelsendo de la mezanglia televidstacio. La Inaŭguro estis meze de la tritaga celebra evento!

David Bisset



## Niaj tagoj en Pollando

Ĉi-jare en majo okazis en Pollando la 18-aj Esperantaj Tagoj de Staszów.

La jam tradician aranĝon organizis la loka E-Klubo kaj partoprenis en ĝi 31 homoj el Pollando kaj unu gasto de Ukrainio.

La solena malfermo kun arta vespero okazis en la loka Kulturdomo. Ĉeestis la urbestro kun reprezentantoj de la urba estraro. La geklubanoj prezentis sian poezian programon kaj fotoekspozicion. Estis eldonitaj de Pola Poŝto okazaj Esperanta poŝtkarto kaj stampo. Prelegis Mikaelo Lineckij de Kievo, Marian Kostecki de Krakovo kaj Kazimierz Strzelecki de Opole. Andrzej Sochacki

## Paeljo, Valencio, Murcia

La 18-an kaj 19-an de majo 2002 okazis la 13-a Kongreso de Valencia E-Federacio kaj Murcia, en la bela vilaĝo Vall d'Uxó, Castellón (Hispanio). Ĉeestis kvardeko da samideanoj, alvenintaj ne nur el Hispanio, sed ankaŭ el eksterlando (Ukrainio, Rusio, Kolombio kaj Francio).



Dum la Ĝenerala Kunveno la ĝisnuna Prezidanto Augusto Casquero (el Valencio) transdonis la prezidantecon al Jose Miguel Bernabeu (el Alicante). La rusa samideano Sergej Maltsev prelegis pri *Esperanto dum la bolŝevisma tempo en Sovetunio*, kaj Augusto Casquero pri *Pilgrimado al Santiago de Compostelo*.

La kongresanoj vizitis per boato, laŭ invito de la Urba Registaro, la belegan groton Sankta Jozefo, kaj gustumis granda paeljon, preparitan de la kasteljonaj gesamideanoj Paco Conejero kaj Inés Comabella, kiel ja tradicias en la regiono. Krom plaĉo al la stomako tio donas agrablan kaj familian etoson. Augusto Casquero

## Sukcesa premiero de BEF

La unua Balta Esperanto-Forumo okazis 14-18 aŭg 2002 en Kaliningrad – la ĉefa urbo de la plej okcidenta regiono de Ruslando. Ĝi estis, verŝajne, la plej internacia el ĉiuj aranĝoj, kiujn organizis ruslandaj esperantistoj. Inter la 123 aliĝintoj (el ili 113 reale partoprenis) el 12 landoj, estis nur dudeko da ruslandanoj.

La forumanoj konatiĝis kun la historio, nuntempo kaj estonteco de Kaliningrad/Königsberg kaj ties regiono, interalie, per prelego de Wolfgang Kirschstein. Aliaj prelegoj estis dediĉitaj al Vladimir Varankin kaj ties *Metropoliteno* (Aleksander Korŝenkov), *Eŭgeno Onegin* de Puŝkin (Valentin Melnikov prezentis fragmentojn el sia traduko), *Korupto en Pollando* (Maciej Wnuk), *Regiona kunlaboro en Nordio* (Kalle Kniivilä), *Ekologio de la Balta Maro* (Ingvar Enghart), *Rilatoj inter Ruslando kaj Ĉeĥio* (Zdeněk Polák). Diverslandaj partoprenantoj faris raportojn, proponojn kaj demandojn en la seminario *Esperanto en Baltio*.

Kadre de BEF-1 okazis seminario pri literatura kritiko, kiun preparis Wolfgang Kirschstein. Li kaj aliaj redakcianoj de *La Ondo de Esperanto* respondis demandojn de legantoj. Pluraj forumanoj profitis la unuataĝan oferton de la eldonejo "Sezonoj", kiu lanĉis la unuan volumon de la kvin-voluma verkaro de Fjodor Dostojevskij en Esperanto. La unua volumo *Blankaj Noktoj* enhavas ses verkojn de Dostojevskij en novaj tradukoj. Du el la tri tradukintoj (Aleksiej Birjuljin kaj Aleksander Korŝenkov) subskribis la unuajn venditajn ekzemplerojn.

Oni havis la ŝancon konatiĝi kun personoj, kies nomojn oni konas, sed kiuj malofte vidiĝas en la movado: Maciej Wnuk, Wolfgang Kirschstein, Vladimir Vyĉegjanin, Stasys Kružnaukas, Aleksej Birjuljin kaj eĉ Alen Kris – tiu mistera poeto (kelkaj kredis ke "Alen Kris" estas plumnomo de alia esperantisto) en BEF unuafoje partoprenis esperantistan kunvenon.

La streĉan laborprogramon agrable variigis interkona vespero, kantkoncerto de studio "Lira" kaj kviza

vespero de Marian Zdankowski. La duontaga ekskurso kondukis al ĉarma banurbo Svetlogorsk (Rauschen).

La Forumo altiris atenton de amaskomunikiloj, kiuj sendis siajn reprezentantojn al la malfermo en la Urbodomo, en kiu la forumanojn alparolis, interalie, la Ĝenerala Konsulo de Pollando, Jarosław Czubiński.

En la aperintaj gazetaĵoj, radiaj kaj televida raportoj estis akcentita la rolo, kiun povas havi esperantistoj, kiel internacia neregistara movado, en la kontaktoj inter Ruslando kaj Eŭropa Unio.

Pluraj partoprenintoj pledis por okazigo de la dua BEF en la sama urbo post unu jaro.

Halina Gorecka



De maldekstre: Edward Kozyra salutas ĉe la malfermo. Valentin Melnikov interpretas por la pola konsulo Czubiński. Maksim Kejda prezidas, Andrej Malaŝenko aŭskultas la interpretadon de Aleksander Korŝenkov



## VIA UNUA VORTARO

### BAZA ESPERANTA RADIKARO.

Wolter F. Pilger.  
Rotterdam: UEA, 2001.  
140p. ISBN 92 9017 076 X.  
13cm. Prezo: € 7,50. Trioma rabato ekde tri ekzempleroj.

Bonega unua vortaro por studento de Esperanto. Krezita malsupra PV, per kies uzado oni lernas ne nur vortojn sed ankaŭ ekscias en Esperanto. Pli ol 2700 radikoj klarigitaj per otroj kaj kurtoj; sentoj, kaj kun indico pri iliaj origino kaj uzo.



## VORTARO DE HEJMA ESPERANTO



Parolantoj de Esperanto, kiuj uzas la lingvon hejme, ofte ne trovas en ordinaraj vortaroj nomon por iu enhejma aĵo aŭ ago. Hejma vortaro helpas al ili. Ĝi proponas Esperantajn nomojn por diversaj citaĝaj aferoj. La Esperantaj kaportoj estas rekonblaj per difino, kiun sekvas traduko en dek tri lingvoj: angla, finna, franca, germana, hebrea, hispana, hungara, itala, japana, nederlanda, portugala, rusa kaj sveda. La materialo kolektis la avoj de la komputil-eta diskaŭto DENASK-1 kaj fondo Familia.

**HEJMA VORTARO.** Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto. Red. Jozefo Lindstedt. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2000 (prezo de la unua eldono, 43p. ISBN 92 9017 005 4, 21cm. Prezo: € 7,50. Trioma rabato ekde tri ekzempleroj.

## Vortaro Esperanto-Suahili

Jan Knappert

Rotterdam: UEA, 1996.  
16+158p., 18cm.

ISBN 92 9017 027 1.

Duobreka poŝtovortaro kun sekzo pri la Esperanta gramatiko. Prezo: € 7,50. Trioma rabato ekde 3 ekz.



## Pionira vortaro por mondlingvo

### KLARA VORTARO ESPERANTA-ARABA.

Georgo Abraham. Rotterdam: UEA, 1998.  
308p. ISBN 92 9017 056 5. 22cm.  
Prezo: € 13,70. Trioma rabato ekde 3 ekz.

"Ĝenero bezata por lernantoj kaj progresintoj!"  
(Fazel Merni)



La araba estis la sola oficiala lingvo de UN Kujis nun malhavas ampleksan Esperanto-vortaron. Jen la unua verko por fortoj kun malkono.  
Klara vortaro Esperanta-araba rezultas el pli ol 10-jara pionira laboro. Ĝi estas klara, lar gija, 15000 kaportoj estas plejparte aranĝitaj laŭ la alfabeto ordo de la vortoj anstataŭ tuj de la radikoj.

## LENNLIBRO EN LA ARABA



Manko de lernolibro por arablingvanoj estis grava bremsilo al la disvastigo de Esperanto en la araba mondo. Ekde nun tiu agado povas disvolviĝi pli facile dank' al la nova lernolibro de Georgo Abraham, kiun UEA eldonis kadre de Kampanjo 2000. La lernolibro konsistas el tri partoj: 10-leciona kurso kun ekzercoj, leĝlaro, kaj konciza vortareto Esperanto-araba. La libro estis prespreĝita de la Instituto Sabz Andeshan en Irano, kiu komposti ankaŭ la pli frue aperintan Klara vortaro Esperanto-araba de Abraham. Preparata estas ampleksa araba-Esperanta vortaro de la sama aŭtoro.

**KURSO DE ESPERANTO. LINGVO INTERNAĈIA.** Georgo Abraham (1916). Rotterdam: UEA, 2000. 120p. ISBN 92 9017 071 9. 21cm. Prezo: € 6,90. Trioma rabato ekde tri ekzempleroj.

## POCKET ESPERANTO DICTIONARY



**POCKET ESPERANTO DICTIONARY**  
ANGLA-ESPERANTO ESPERANTO-ANGLA  
de Andrew Nelson

Rotterdam, 2001. 14+69p. 18cm

Ĉiuj ekde de la plej granda kaj senprezenta vortaro kun pli ol 70 000 titoloj

de

ELDONITO LINGVA

Nova eldono de UEA

Memu la la Librovarejo de UEA

Prezo: € 15,00. Trioma rabato ekde 3 ekz.